

Bulgara Esperantisto

Majo 1989



ENHAVO

- II Mi kaj mia societo (Geno Manev, Stojan Pavunčev, Nikola Pilev, prof. d-ro Kiril Popov, Veneta Baleva)
- 3 Trezorejo de bulgara E-kulturo (Mariana Elenova)
- 8 Esperantistoj pri 21-a jarcento (Penjo Stojanov)
- 10 Angulo por komencantoj (Evgeni Georgiev)
- 11 Malproksima insula gasto (Antoaneta Nikolaeva)
- 12 Originala verkaro (Nikola Pilev)
- 14 Biografia divenludo (Bernard Golden)
- 16 Kanto „Iras vojaĝantoj“ (Ivan Ivanov)
- 18 Internacia filatela ekspozicio „Bulgario'89“ (Radi Bančevski)
- 19 Esperantisto-centjarulo (Dimo Martinov)
- 20 Verda Objektivo (pri Kiril Kalčev)
- 23 Leteroj de korespondamiko (Stanka Dimitrova, Cvjatkjo Todorov, Acuŝi Hoŝida)
- 25 Scienco
- 26 Enlanda movado
- 28 Adresaro
- 29 Memore al Georgi Cvetkov
- 30 Sub la cirka kupolo (Atanas Ilkov)
- 32 Deziras korespondi
- III Kie, kiam, kio

Ĉefredaktoro: Maria JANKOVA

Redaktoroj: Atanas ILKOV kaj Evgeni GEORGIEV

REDAKCIA KONSILANTARO: Dimităr HAĜIEV, Krăstju KARUCIN, Kunčo VĂLEV, Nikola NIKOLOV, Venelin MITEV

Adreso de la redakcio: „Ĥristo Botev“ 97, 1303 Sofio — Bulgario, tel. 22-80-86.

Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov“ — bul. „Lenin“ 117, 1113 Sofio

Al la kunlaborantoj: Kontribuaĵojn por la koncerna numero ni akceptas du monatojn antaŭe. La materialoj devas esti koncizaj kaj konkretaj, verkitaj nur en Esperanto, tajpitaj aŭ klare skribitaj. Por publikigo sendu bonkvalitajn fotojn. La Redakcio ne resendas manuskriptojn kaj fotojn.

Abonkondiĉoj: En Bulgario „Bulgara Esperantisto“ estas abonebla nur per la poŝto, kontraŭ 4.80 lv. En ĉiuj socialismaj landoj — per la koncerna poŝto. Por aliaj landoj — pere de UEA aŭ per niaj perantoj, kontraŭ 32 nederlandaj guldenoj aŭ egalvaloro en nacia valuto. La abonprezo por socialismaj landoj en Bulgario estas 7.32 lv., por la ceteraj landoj — 7.80 lv. Prezo de unuopa ekzemplero — 0.50 lv. aŭ 3 ned. ged.

Estas organizita regula surbendigo de „Bulgara Esperantisto“ por la bezonoj de la blindaj esperantistoj.

Sur la unua kovrilpaĝo: Printempo.

Foto: Georgi KESARIJSKI

*Mi kaj
mia societo*

NI INTERŜANĜU SPERTON!

Estas ĝojige, ke la Redakcio serĉas pli intimajn kontaktojn kun E-societoj, kio certe „alproksimigos“ revuon „Bulgara Esperantisto“ al la societoj — bazaj unuoj de BEA, kaj mi esperas, ke tio komencos ludi pli gravan rolon en la evoluo de la E-movado. Io, kio ĝis nun ne okazis.

Ni opinias, ke ankaŭ aliaj societaj estraroj bezonas interŝanĝon de sperto pri okazigo de iuj aranĝoj kaj aktivecoj. Ekz. kiel la malgrandurbaj E-societoj varbas kursanojn por lernado de Esperanto, ĉu ili estigas membrojn de la societo kaj aktivaj agantoj de la E-movado, kiujn agadformojn oni aplikas por tio ktp.

Nia urbo estas tre malgranda — 11 000 loĝantoj. Kvankam E-societo „Ivan Vladkov“ en Drjanovo dum la lastaj 10—15 jaroj estis unu el la unuaj en la antaŭa Gabrovo-distrikto, ties agado apenaŭ estus interesa. Ni unuaj en la distrikto okazigis lernejanajn kursojn. La lernejoj estis el Sevlievo, Gabrovo kaj apudaj vilaĝoj. Post la finiĝo de la kursoj ili forlasis Drjanovo-n. Pro tio alfluo de novaj membroj al nia urba societo preskaŭ ne estis.

Se „BE“ malfermus rubrikon „Nia sperto“ kaj provokus la societajn estrarojn partopreni aktive, mi opinias, ke tio ludos gravan rolon en la vivo de E-societoj.

**Geno MANEV,
E-societo „Iv. Vladkov“,
Drjanovo**

TIEL NI AGADAS

La renovigo igis nin ŝanĝi la strategion de nia societo. Antaŭe ni strebis varbi multajn kursanojn, neklopodante multe pri la kvalito kaj pri ties reteno en la Esperanto-movado. Ni raportis pri multaj kursoj, pri multaj novaj membroj kaj neniu interesiĝis pri la finrezultoj. La renovigo starigis al ni la demandon, ĉu ni lasos heredantojn?

(Daŭrigo sur paĝo 5)



Jaro 58

N-ro 5

Bulgara Esperantisto

**ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO, FONDITA EN 1919,
DISTINGITA PER ORDENO "KIRIL I METODIJ" — I GRADO**

Forĝejo de bulgara E-belliteraturo

Bulgaraj originalaj belartaĵoj aperis sufiĉe pli malfrue post la starigo de la movado en la lando. En bonega nia gazeto „Rondiranto” (1901—1904) oni trovas eĉ eron de bulgara aŭtoro. La modesta gazeto „Unua Paŝo” (1905—1906), eldonata de grupo da verkemaj junuloj, aperigis nur 12 poemojn, verse aŭ proze. Malpli fruktdona estas la organo de iama Bulgara Esperantista Ligo „Lumo” (1907—1910) — entute 9 poeziaĵoj. Ĝis ekapero de „Bulgara Esperantisto” preskaŭ ne estas bulgara kontribuo belarta en eksterlandaj Esperantaj periodaĵoj. Do, ni pravas aserti, ke „Bulgara Esperantisto” metis la fundamentan ŝtonon de nialanda originala poezio kaj prozo, flegis ilin, kreskigis ilin. Estas nur 2—3 kazoj, kiam en la koncerna jarkolekto mankas originalaj belliteraturaĵoj.

La lingvo de la statistiko konstatas ke en siaj 70 jarkolektoj la gazeto donis lokon al 136 aŭtoroj kun 564 eroj. Esprimis per versoj kaj prozo siajn impetojn junuloj kaj aĝuloj, kiuj ne lasis postsignojn sur la literatura kampo, sed havis el profunda koro diri ion al la aliaj. Poemojn aŭ prozaĵojn aperigis junuloj, kiuj poste estiĝis eminentuloj en la bulgara literaturo kaj scienco, kiel akademiano Petâr Dinekov, prof. Cvetan Stajkov, Georgi Bataklijev. Tentis sin esprimi poezie aŭ proze revojn kaj strebojn pioniroj kaj elstaraj esperantistoj kiel Georgi Ak-

targiev, Ilija Silvestriev, Penko Stoev, Ivan Dobrev, Atanas Lakov, Georgi Stanev, Todor K. Popov, Stefan Kadiev, Petâr G. Pamporov, Ivan Kovaĉev kaj multaj aliaj. Ili ne havas la konvinkon, ke kreas belliteraturon, sed ili dividis kun aliaj siajn plej intimajn pensojn kaj sentojn. Ne vane tiuj verkoj okupis lokon sur la gazetaj paĝoj. Sed sur la paĝoj de „Bulgara Esperantisto” elkreskis ankaŭ ĉiuj bulgaraj esperantistaj poetoj kaj prozistoj, ĉu la plej elstaraj, ĉu pli modestaj.

La poezia branĉo okupas pli da loko. Ankoraŭ en la dua jarkolekto aperis ĉe poezio la nomo de Petâr Jordanov, konata per siaj freŝaj, esperplenaj poemoj en gazeto „Lumo” antaŭ deko da jaroj. Ne multon li aperigis en „Bulgara Esperantisto” (entute 9 erojn), sed lia kunlaboro daŭris longan periodon (ĝis 1940).

Simeon M. Simeonov aperis per sia intima liriko en tria jarkolekto. Dum tri jaroj li estis tre produktema, poste malaperis por manifesti sian ĉeestadon ekde 1957 kaj feliĉe li ĝojigas nin ankoraŭ en la nunaj tagoj (laste en 1988). Liaj kontribuaĵoj nombras 25 erojn.

Haste la literaturan parton de la gazeto ekde ĝia kvara jaro enpaŝis Dimitâr Zlatarski, plej ofte modeste subskribinta sin per la pseŭdonimo Miti. Majstre li posedis la version, esprimis impone tenerajn lirikajn sentojn kaj akran civitanan konscion. En ĉiu ero

sentiĝis la granda poeto. Lia kunlaboro daŭras dum la tuta posta ekzistado de „Bulgara Esperantisto“. Liaj verkoj sur la gazetaĵoj nombras 36 erojn. La lastaj du aperis en 1988.

La plej granda bulgara Esperanta poeto Asen Grigorov por unua fojo aperis en sesa jarkolekto. Lia elpaŝo, kiel tiu de Dimităr Zlatarski estas forta, venkoplena. Abundis liaj emociaj lirikaĵoj kaj socitemaj poemoj sur la gazetaĵoj ĝis lia neforgesebla forpaso. Eĉ kiam li estas en la malliberejo pro politika akuzo li trovis manieron liveri al la redakcio sian brilan „Mia kanto“, subskribitan per la inicialoj M. L. de lia pseŭdonimo Marin Ljubin (jarkolekto XXII, kajero 9—10, nov.-dec. 1941). Tiu poemo estas presita ankoraŭ dufoje en postaj jarkolektoj. Liaj kontribuoj entenas 34 poemojn.

La elstara nia Esperanta poeto Ĥris-to Gorov debutis en deka jarkolekto per rakonto. Per poezio, malgraŭ ke li eldonis libroforme poemon ankoraŭ en 1929, li komencis kontribui nur ekde 1961 kaj daŭras ankaŭ en hodiaŭaj tagoj. De li aperis entute 17 poemoj.

En deka jarkolekto komencis aperi poezion Stefan Masárov tre esperige. Li subskribis sin plej ofte per la pseŭdonimo Persifal. Bedaŭrinde depost 1940 li eksilentis. Talente eniris la poezian kampon en 1937 Violin Oljanov, subskribante ofte per la pseŭdonimo Zefiro. Lia ĉeesto sur la gazetaĵoj daŭras ĝis nun. De li aperis 14 eroj. Dum la jardeko 1930—1940 promesodone presigis en la gazeto poezion, esprimantan sociajn motivojn, Vitali Julzari (pseŭdonimo Kaj Tera), Marin Bălgarenski (pseŭdonimo Rinma) kaj Georgi Dikovski. Post la milito nur la lasta daŭrigis verki kaj liaj kontribuoj en la gazeto atingis la ciferon 10.

En la postmilita periodo oni povas distingi la nomon de aro da talentuloj. Miĥail Langov ekde 1957 ĝis 1962 aperigis 10 erojn. La frua forpaso ne permesis al li disvolvi siajn eblojn. La tenerajn poemojn de Todor Ŝoŝev ni ĝuas ekde 1958. Entute li aperigis 7 erojn. Veneiln Mitev debutis tute juna en 1959 kaj en daŭro de la tempo li firmiĝis kiel elstara poeto. Prezentita

li estas per 6 poemoj. Canko Murgin jam aŭtoro de poemkolekto en du eldonoj, presigis poezion en „Bulgara Esperantisto“ unuafoje en 1961. En postaj jarkolektoj lia kontribuo estas tre modesta. Por unua fojo aperis sur gazetaĵoj la nomo de Toma Ajolov en 1963. Li tamen ne estis komencanto en la poezio. En aliaj periodaĵoj li aperigis poemojn ekde 1929. Liaj kontribuoj nombras 10 erojn. Firme ekde 1969 ekstaris sur la poezia bran-

(Daŭrigo sur paĝo 4)

EL LA MALNOVAJ PAĜOJ

KIEL PROPAGANDI?

Iufoje niaj samideanoj plendas, ke la socio ne atentigas Esperanton kaj malzorgeme rilatas al ĝi, ke Esperanton oni opinias malserioza kaj nenecesa. Rigardu la vivon, la praktikon kaj serĉu la kialojn. Kial oni tiamaniere rilatas al Esperanto? Ja ni havas post ni ĝian historion, vivon, batalon kaj multajn venkojn en la daŭro de 45 jaroj; ni havas organizaĵojn — landajn kaj internaciajn; ni havas niajn multajn gazetojn, ĵurnalojn kaj revuojn; Esperanto faris ĝis nun multegajn praktikajn servojn al vojaĝistoj, turistoj, ideaj movadoj, al sciencistoj k. t. p.

La kialon ni serĉu unue ĉe ni. Ni demandu nin: „Kiel prezenti Esperanton al la vasta publiko?“ La respondo estas: prezenti ĝin en ĝiaj praktikaj servoj kaj utileco, en ĝia literaturo kaj spirito. Por prezenti ĝin tiel ni bezonas personojn seriozajn kaj instruitajn. La kaŭzo kial la socio ne ĉiam favore rilatas al Esperanto estas tiu, ke neseriozaj personoj ĝin prezentas en multaj okazoj.

La estimata universitata profesoro s-ro d-ro Al. T. Balan, kiu antaŭ jaroj estis kontraŭulo de Esperanto, nun vidante la praktikajn servojn, kiujn ĝi donas diris ke, „efektive Esperanto estas lingvo en skatolo, kiun oni povas ĉien porti kaj uzadi“.

Vastajn rondojn por nia propagando prezentas la lernantaro. Grandega estas ĉe ili la intereso al la lingvo, kiu donas flugilojn al la spirito por transflugi la landlimojn por vidi, sperti kaj ekkoni la mondon, la homaron, por eksenti la pulson de la intensa internacia vivo. La servoj, kiujn Esperanto proponas pri la lernado de geografia, lingvoj k. a., ne estas neglektindaj.

Kaj efektive ni vidas, ke dum la lasta jaro en multaj gimnazioj oni gvidis kursojn, oni fondis societojn kaj Esperanto diskoniĝis kaj populariĝis.

Al tiu rondo de nia propagando ni direktu niajn fortojn serioze por paroladoj, kursoj; almontrante la praktikajn kaj sciencajn utilojn, kiujn portas la lingvo.

Ni estu pretaj dum la venonta jaro por tiu pli vasta kaj serioza laboro!

Simeon HESAPČIEV,
„BE“, XIII, N-ro 7—8,
marto—aprilo 1932

Trezorejo de bulgara E-kulturo

Estas konata la fakto, ke pri la kulturnivelo de iu nacio atestas la kvalito kaj kvanto de la konservitaj kulturaj valoraĵoj. Kompreneble, tio tute validas ankaŭ por la E-movado. La esperantista popolo estas vere zorgema pri siaj E-posedaĵoj. La plimulto de la esperantistoj fervore kolektas kaj konservas ĉion, kio rilatas al Esperanto kaj en Esperanto aŭ estas ligita kun la nacia kaj internacia E-movadoj. Fondiĝis kelkaj E-muzeoj. Antaŭ pli ol duon-jarcento ekestis Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno, sekvis Esperantaj muzeoj kaj bibliotekoj en Hungario, Hispanio, Francio, Svislando. Ekzistas multe da riĉenhavaj kaj valoraj E-bibliotekoj privataj. Ekzistas aŭ ekzistis, ĉar jam malaperis iuj el ili nur pro la malinteresiĝemo de la heredantoj al Esperanto! Tiu ĉi problemoj jam akre staras antaŭ ni ĉiuj: ĉu post kvindek aŭ cent jaroj niaj posteuloj — la estantaj bulgaraj esperantistoj, havos la kaŭzon fieri pro la heredaĵo de bulgara Esperanto-movado.

Praktike tiun ĉi problemon starigis antaŭ si la neforgesabla veterano d-ro Boris Nedkov. Li fondis Bulgaran Esperanto-Muzeon la 1-an de aprilo 1963 kaj multajn jarojn sindone laboris por ĝi. Li kolektis rezulte de donacoj, interŝanĝoj kaj aĉetado sufiĉe grandan stokon de E-libroj, periodaĵoj, arkivaĵoj kaj diversaj esperantaĵoj. En la konservita en BEM kajero pri liaj korespondaĵoj oni povas vidi skribitajn de li multajn paĝojn rilate la kolektadon de tiuj ĉi materialoj. La unua ricevita letero datiĝas de la 10-a de aprilo 1963. La sendinto estas Hugo Steiner — la fama fondinto de Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno (IEMW).

La nomo „muzeo“ iom misgvidas: pli ĝuste, IEMW estas la plej ampleksa Esperanto-fakbiblioteko. Mi permesis al mi citi tiujn ĉi vortojn de la direktoro de IEMW Herbert Mayer, publikigitajn en la n-ro 1/1989 de revuo „Esperanto“, ĝuste pro tio, ke parto de ili tute konvenas ankaŭ al la laboro de BEM. Nome la vorto „muzeo“

misgvidas. Ni povus diri, ke BEM estas sufiĉe ampleksa E-fakbiblioteko. Nia biblioteko disponas pri pli ol 4000 libroj — belliteraturo, lernolibroj (iuj el komencaj jaroj de Esperanta lingvoeldonado), periodaĵoj (pli ol 450 titoloj). Kompreneble, tio estas fruktoj de la laboro ne nur de d-ro Nedkov, sed ankaŭ de nia veterano Krâstju Karucin kaj de pli ol 100 donacintoj-esperantistoj. Inter ili estas homoj, kiuj pruvis sian civitanan kaj esperantistan konsciencon, donacinte multfoje al BEM. Nepre mi volus mencii la nomojn de heredantoj de Ivan Krestanov, Asen Grigorov, de Nikola Aleksiev, Canko Murgin, Atanas Lakov, Atanas D. Atanasov (ADA), Ivan Sarafov, Simeon Petkov, Simeon Ĥesapĉiev, Ivan Kovaĉev, Metodi Panĉev ktp. En 1988 en BEM estis ricevitaj donacoj de Nikolaj Filipov el Sofio kaj de Ljubomir Dojĉev — bulgara verkisto, filo de la esperantisto Dojĉo Kolev. La lasta donaco datiĝas de januaro 1989 — de Orfej Ĉakârov el Svilengrad. Li donacis E-librojn de sia forpasinta patro.

Donacojn faris ankaŭ Centra Estraro de BEA, Bulgara Esperantista Kooperativo, Fervojista kaj Turista Sekcioj ĉe BEA, eksa tuturba sofia E-societo „Maksim Gorki“, E-societoj „Vekiĝo“ en Ŝumen kaj „Marek“ en Stanke Dimitrov.

La muzea kolekto estas tute modesta. Ĝi konsistas el diversaj esperantaĵoj: flagetoj, kalendaretoj, poŝtkartoj kaj poŝtmarkoj, blazonoj, objektoj kun E-surskriboj ktp.



Parto de la kolekto de BEM



En la muzeo.

Foto: Aleksej DIMITROV

Ĉiuj ili estas donacitaj de entuziasmoj bulgaraj aŭ fremdlandaj. Dum la lasta jaro tiurilate plej aktive kunlaboras kun ni la esperantista grupo el Bilbao (Hispanio).

Kiel la E-societoj kaj ĉiu esperantisto povas helpi la pliriĝigon de la kolektoj de BEM? La E-societoj kontrolu siajn bibliotekojn kaj se troviĝas malnovaj duoblaj E-libroj, periodaĵoj kaj esperantaĵoj, bonvolu

informi pri tio la muzeon por eventuala interŝanĝo. Se okaze de iu ajn festo aŭ jubileo via societo produktas iun esperantaĵon, aŭ eldonas broŝureton, poŝtkarton kun E-surskribo, insignon, kalendareton ktp, ni petas vin sendi unu ekzempleron al BEM. Se vi aperigas pri Esperanto anoncon aŭ artikolon en via loka gazetaro, estu tiel afablaj sendi unu ekzempleron! Ĉiu libro, periodaĵo aŭ objekto, ligita kun Esperanto, estas danke akceptata de ni!

Por ke nia biblioteko transformiĝu en modele funkciantan oni devas ankoraŭ multe labori. La plej grava tasko restas la pliriĝigo de la kolektoj — ĉefe per donacoj: temo tre aktuala pro sia nobleco en nia socio! Tiurilate povas helpi ĉiu el vi, estimataj legantoj, posedantoj de riĉaj aŭ malpli riĉaj privataj E-bibliotekoj.

Por la vizitantoj de BEM ni komunikas nian adreson: Sofio, kv. „Nadeŝda“, str. „Saŝo Miŝov“, bl. 119 et. 1, telefonnumero: 32-77-21. Ĉiuj ŝatantoj de la E-literaturo estas bonvenaj! Nia korespondadreso estas: 1303 Sofia, bul. „Ĥr. Botev“ 97, Bulgara Esperanto-Muzeo.

Mariana ELENOVA

Forĝejo de bulgara E-belliteraturo



ĉo Ljuba Bojaĝieva. Tre fruktodone ŝi kontribuas al la gazeto sed la neaten-dita morto rompigis ŝian supreniron. Ŝi aperigis 19 poemojn. Penka Papazova ekde 1974 ofte aperigas sian intiman lirikon. Ŝiaj eroj atingis la ciferon 19. Por unua fojo sur la paĝoj de „Bulgara Esperantisto“ aperis la nomo de Georgi Miĥalkov en 1975, talente verkanta ankaŭ sur beletra kaj drama branĉoj. En tiu periodo indas menciigi ankaŭ la poeziverkantajn nomojn de Rosica Georgieva, Nikola Pilev, Olga Andreeva, Ŝinka Filaretova, Dimitâr Denĉev, Danĉo Danĉev, Marin Bâcev, Asen Josifov kaj aliaj.

En 1987 aperis la ampleksa volumo „Rozo kaj glavo“, antologio de bulgara originala Esperanta poezio. Ĝi entenas 63 aŭtorojn kun 198 erojn. El „Bulgara Esperantisto“ estas eltiritaj 50 aŭtoroj kun 118 eroj.

Beletra branĉo estas prezentita sufiĉe pli modeste ol la poezia. Por la periodo ĝis la malpermeso de la gazeto en 1942, do 23 jarkolektojn, ni povas montri nur du nomojn, tiuj de Atanas D. Atanasov — Ada kaj de Zora Mladenova-Hans, ofte kaŝanta sin sub la pseŭdonimo Stela Morbilli. Ada aperigis en tria ĝis kvina jarkolektoj tri rakontojn el sia presota libro „El la intima libro de la verdurbaj esperantistoj“ kaj ĉapitrojn el siaj „Rememoroj de esperantisto“. Zora Mladenova-Hans ekde kvara ĝis sepa jarkolektoj aperigis 7 prozaĵojn, sed veraj rakontoj estas nur 2. En 1962 denove aperis ŝia rakonto.

Postmilita periodo firmigis vicon da nomoj kiel veraj beletristoj. Nevena Nedelĉeva komencis kunlabori ekde 1967 kaj aperigis 12 rakontojn, priskribantaj la vivon kaj animstaton de la ordinaraĵoj. Ŝi aperis sur gazetaĵoj ne kiel komencantino. Malan-

taŭ si ŝi havis kelkajn memstarajn librojn en bulgara. Ivan Draganov aperigis ekde 1966 9 rakontojn, tre maturaj, forte impresante. Reliefigis ankaŭ la rakontoj de Miĥail Ŝekerĝiev (7 eroj). La rakontoj de Rajna Konstantinova forte enprofundiĝas en la homa animo. Ŝi aperis nur en 1978 kaj la frua morto ĉesigis la florantan talenton. Ŝi aperigis 5 rakontojn. Kaptas la atenton kiel rakontistoj Miĥail Ĝobanov (5 rakontoj), Stojan Konstantinov (3 rakontoj), Stefan Sokolov (5 rakontoj). Du nepreterlasindajn rakontojn en 1966 aperigis ankaŭ la veterana literaturisto Ivan Ŝivarov.

Ljudmila Paspaleeva, forpasinta en juna aĝo, lasis al ni 7 bonajn rakontojn por infanoj. Aliaj notindaj aŭtoroj de rakontoj estas Simeon Ĝirpanliev, Penka Batoeva, Neli Abaĝieva, Nadja Sirkova, Dimo Truduljubov, Nadja Ĵejnova. Rakontojn publikigis ankaŭ la poetoj Ĥristo Gorov, Ljuba Bojaĝieva kaj Georgi Miĥalkov.

Gazeto „Bulgara Esperantisto“ estas vera forĝejo de nialanda originala Esperanta belliteraturo. Jen estas la historia merito de la gazeto sur tiu kampo.

Krâstju KARUCIN

Mi kaj mia societo



Kaj ni komencis per plibonigo de nia kursa agado. Niaj kursoj jam estas kun pli malmulte da partoprenantoj — inter 10 kaj 15, kies profesioj, intereso, kapabloj, klereco estas samaj aŭ proksimaj. Niaj kursoj jam ne daŭras kelkajn monatojn, ĉar ni vivas en la tempo de la rapideco. Kaj ankaŭ pro tio, ke estas vero — neniun kursano trafolumas hejme la lernolibron. Ni orientiĝis al rapidaj kursoj — tri semajnoj po tri lernohoroj ĉiuvespere. Kaj tiuj kursoj donis siajn unuajn kaj pli bonajn rezultojn.

Sed ankoraŭ ne sufiĉas la teknikiloj en la instruado. Kaj verŝajne, se ni havus ekzemple videoaparatojn, komputilojn ktp., ni allogus pli multe da intelektuloj, precipe sciencistoj kaj teknikistoj.

Nun ni ne rapidas akcepti la kursanojn en la societon tuj post la eniro en la kurson. Ni prezentas al ili la vivon de nia societo, informas ilin pri la eblecoj de Esperanto kiel ponto inter la homoj kaj popoloj, inter la kulturoj, ni informas pri la aplikado de la Internacia Lingvo en la faka agado, en la intereso kaj profesioj de la homoj. Ni invitas ilin esti membroj de nia societo, kiam ili ricevas sian atestilon pri lingvoscio de unua grado, tiam, kiam oni jam povas diri, ke estas novaj esperantistoj.

Gravas en la komenco tuj doni al

la novaj membroj eblecon praktiki la lingvon. Bedaŭrinde, la bulgaraj aranĝoj ofte pasas bulgarlingve kaj pro tio ni preferas helpi ilian partoprenon en internacia aranĝo. La praktikado tuj post la esperantistiĝo estas la plej alloga, ĝuste ĝi retenas la novulojn!

Ni aktive laboras por la lingvoperfektigo de niaj novaj esperantistoj — tuj ni aligas ilin en kursojn de dua grado, en la parolantaj rondojn. La societo monhelpas la partoprenon en diversaj kursoj.

Ni scias, ke tiuj homoj restos ĉe ni nur, se ni distrigus iliajn ĉiusemajnajn renkontiĝojn, ĉar la homoj venas kaj atendas ricevi ion. En la komenco ni devas doni, kaj poste — per de ili ion por plibonigi iliajn renkontiĝojn. Potenco estas en la kluboj laŭ profesioj kaj intereso, sed ankoraŭ ni ne atingis ilian aktivigon. Eble la sekcioj de BEA ankaŭ devas fari ion por la novaj esperantistoj-fakuloj.

Hodiaŭ ni ne raportas pri multaj membroj, pri multaj kursoj. Nun ni raportas pri la realaĵo, kiu estas ĉe ni. Venu vidi ĝin!

Stojan PAVUNĈEV,
prezidanto de E-societo
„Sukceso“ en Vraca

DECIDAJ PERSONOJ

Post la lasta plenkunsido de CE de BEA, okazinta 11-an de februaro

1989, mi ofte pensas pri la ĉefaj solvindaj problemoj en nia E-movado dum la tempo de renovigo. La baza raporto farita de nia prezidanto Sava Dâlbokov, abundis je problemeco kaj memkritikemo. Sed la multnombraj parolintoj preferis trakti precipe ekstersistajn problemojn. Oni serĉis la panaceon, sed laŭ mi, ne tute trafe.

La ŝlosilo de tiel arde dezirata renovigo troviĝas en la societa agado kaj des pli konkrete — en nia persona, celkonforma aktivado kiel gvidantoj, instruistoj aŭ ordinaraj membroj. Ĉiu scias, ke la elementa konstruiva ĉelo de nia organiza strukturo estas la E-societoj. Nature aperas la demando: ĉu regule kaj sufiĉe efike ni laboras por krei vivoplenajn, unuecajn kaj rezultodonajn societajn kolektivojn? Mia opinio, en tiu ĉi transira etapo al renovigo, ni ankoraŭ ne sukcesis fari tion. Ekzemple, en departemento de Ĥaskovo nur 4–5 societoj pli malpli aktivis, la ceteraj profunde dormas. En vilaĝo Uzunĝovo oni proponas eĉ fermon de la tiea societo ktp.

La problemoj de stabiliĝo kaj evoluo de la societoj estas nek novaj, nek facilaj. Tio dependas de multaj internaj kaj eksteraj faktoroj kaj de ties reciproka kunordiĝo. Antaŭ ĉio, ni devas bone kompreni la specifon de niaj societoj de organiza, idea, kulturkleriga kaj socia vidpunkto. La ĝisnuna praktiko montras, ke la esperantistaj kolekti-

voj de la societoj estas tre fragilaj kaj ties membroj — serĉemaj kaj sentemaj. Ili aniĝas libervole, plenumante E-agadon paralele kun siaj profesiaj okupoj. Ili venas la E-medion por trovi ion novan kaj interesan, kiu eble mankas en la neesperantista aktivado. Se ni ne sukcesas krei tian altiran, konforman etoson kaj proponi favorajn premisojn por realiĝo de la personeco de ĉiu aparta membro, oni forlasas la societon aŭ restas nur kiel formalaj anoj. Kelkfoje la salajrataj E-agantoj ne konsideras tion kaj la rezultoj plej ofte estas negativaj. Konklude mi volus emfazi, ke ni devas tre atente konstrui kaj gardi la altiran Esperantan lumturon, kiu formas la societon kaj kreskigas ties kolektivon.

Kiuj estas la plej gravaj faktoroj pri progresigo de iu societo?

Unualoke tio estas la personeco de la prezidanto de la societo. Lia devo estas apostole labori, sinofere kompetente kaj altnivele okazigi oftajn kaj diversajn aranĝojn kaj kursojn. Li devas gvidi principe senmonopole, tolereme, evitante subjektivecon kaj bagatelemon, direktante la komunan agadon laŭ ĝusta ideo kaj kultur-kleriga vojo konforme al la ĝenerala socia evoluo de la lando. La praktiko donas multajn ekzemplojn tiurilate. Versajne iuj min apostrofus: „Do, de kie ni prenu tiajn personojn?”. Ili troveblas inter ni kaj se ne estas sufiĉaj, ni devas krei kaj eduki ilin. La Buroo de BEA povas organizi ĉiujare specialajn kursojn por E-kadroj aŭ uzi aliajn formojn. Sed ĉiujn kandidatojn oni esploru anticipe pri iliaj gvidkapabloj kaj aliaj kvalitoj.

La alia, ne malpli grava personeco en la societo estas tiu de E-instruisto, de kiu dependas grandparte la finaj rezultoj de la tuta agado de la societo. Krom bonajn lingvajn konojn, la instruisto devas havi konforman kaj klaran idean pozicion. Se oni instruas paralele kun la lingvo la ideon de E-movado, nepre kreigos perspektivaj novaj esperantistoj. Alikaze venos fuŝnaskitaj societanoj. Bedaŭrinde, la instruprogramoj aprobitaj de la Instrukomisiono ĉe BEA, donas prioritaton nur al E-grammatiko. Eĉ en la programo por la supera III grado mankas instruhoroj pri literaturaj, historiaj kaj primovadaj demandoj.

Estas multaj problemoj en la instrulaboro de la societoj en nia departemento. Unuflanke, la diplomitaj lektoroj estas nesufiĉaj kaj aliflanke la organizitaj kursoj estas malmultnombraj eĉ en urboj, kie troviĝas E-instruistoj. Ekzemple en

Haskovo funkcias nur unu eksterlerneja kurso, en la lernejoj — neniu. Simila estas la stato en Kârĝali, Harmanli, Svilengrad k. a. En la sama tempo en la ĉefartikolo de „Bulgara Esperantisto” numero 11/1988 la prezidanto de KISA (Instrukomisiono) Violin Oljanov deklaras: „La Komisiono pri Instrua kaj Scienca Agado (KISA) opinias, ke en nia lando estas gvidataj sufiĉe da kursoj por Esperanto-lernado... En la lando elstaras konsiderinda nombro da bonaj instruistoj... Dank' al tiu agado la internacia lingvo Esperanto populariĝis vaste en la popoltavoloj. Tio tute ne respondas al la vera stato. Eble la prezidanto de KISA havas aliajn kriteriojn pri kvanto kaj kvalito. Surbaze de tiu nereala fundamenta konkludo KISA pludonas ankoraŭ 9 direktivojn, kiujn nomas „Strategio de la eksterlerneja Esperanto-instruado”. Al mi ŝajnas, ke la plua komento estas superflua. Evidentiĝas, ke KISA devas grave korekti siajn konceptojn kaj programojn.

Ne malpli signifa estas la rolo kaj la rilato de la E-veteranoj por la unueco kaj progreso de la societoj. Iliaj sperto, sindonemo kaj formitaj virtoj estas bonega ekzemplo por la novaj kaj junaj esperantistoj. Erara estas la sinteno de tiuj societaj estraroj, kiuj klopodas izoli la veteranojn. Neakceptebla tamen estas la sinteno de veteranoj, kiuj abrupte kaj diktatore enmiksiĝas en la societan vivon. Tio ege malhelpas la normalan laboron de la societoj, fuŝante ties kolektivojn.

Fine, mi povus ĝeneraligi, ke la nivelo de ĉiu societo dependas precipe de ties personoj: prezidanto, instruistoj kaj veteranoj. Tial la Centra Estraro de BEA devas dediĉi pli multe da zorgoj kaj fortoj al tiuj kadroj. Tiukaze la bonaj rezultoj nepre venos.

Nikola PILEV,
Haskovo

„SE MI ESTUS...”

Se mi estus prezidanto... Do, tio estas respondeca tasko. Ĉar post la rekonstruo la komunumaj E-societoj estiĝas bazaj kernoj por renovigo de Esperantaj movado kaj instruado, por popularigo kaj disvastigo de Esperanto. Mia ĉefa devo estus organizi la regulan E-vivon en la komunumo, rilati al komunumaj organizaĵoj, al ne-esperantistoj por komunaj iniciatoj. Mi enlistigas la esperantistojn — iliajn adresojn, fakajn interesojn. Laŭ nia jarplano la

estraro devas regule kunsidi kaj m Kiel prezidanto devas informi pri rilatoj kaj postuloj flanke de la Centra Estraro de BEA kaj de la komunumo, pri la plenumo de la plano kaj pri la antaŭstarantaj taskoj. Ankaŭ ĉiu estrarano informas koncize pri la sukcesoj kaj malfacilaĵoj en sia branĉo kaj ni ĉiuj tiamaniere helpante unu la alian, gvidas la E-movadon en la komunumo.

Sed, mi ne estas prezidanto de societo. Mi estas prezidanto de sekcio. La sekcioj pri profesioj kaj interesoj ĉe Centra Estraro de BEA havas taskon helpi la enkondukon de Esperanto en la praktikon laŭ fakoj kaj intereso de esperantistoj. Pro tio en la komunumo oni organizas klubojn pri profesioj kaj intereso. La estraro de la societo rekte gvidas tiujn klubojn. La klubanoj membras en la societo, kie ili pagas la kotizon, elektas kaj estas elektataj. Kie estas E-kulturdomoj ili ankaŭ rilatas metodike al la kluboj pri profesioj kaj intereso, cele al la amaskulturaj iniciatoj. La estraro de la sekcio, akorde kun la jarplano de CE de BEA, rilatas organize kaj metodike per la komunumaj societoj al la kluboj. La sekcia estraro sendas informojn pri spertinterŝanĝo pere de Esperanto, pri internaciaj kaj naciaj aranĝoj kaj proponas al ĉiu klubo semajne aŭ monate, sed, regule, organizi parolantajn rondojn, kunsidojn k. a., kie oni parolas nur Esperanton, diskutas, perfektigas en la lingvo, ekposedas la terminologion kaj popularigas fakajn atingojn.

Tiel la societo fariĝas vera, reala, baza kerno de Esperanto en la komunumo. La kluboj esprimas la fakajn interesojn, kunlaboras kun fakuloj ne-esperantistoj en la lernejoj, oficejoj, uzinoj ktp.

Tiel oni komprenas la uzon, utilon kaj signifon de Esperanto en la ĉiutaga vivo, en la rilatoj kaj komunikado.

Prof. d-ro Kiril POPOV,
prezidanto de Medicina
E-Sekcio de BEA

„MI ATENDAS VIN...”

Regule la kunvenojn vizitis ne pli ol 20 personoj (el pli ol 100 membroj). Tiel mi memoras ĝin, ankoraŭ de kiam mi por unua fojo ĉeestis kunvenon de societo „Kosta Penev”, kondukita tien de mia eksa kursgvidanto Violin Oljanov.

Ne ŝanĝiĝis la afero ĝis la hodiaŭa tago. Intertempe tamen ŝan-

ĝiĝis tri prezidantoj kaj subite oni elektis min kiel kvaran. Tio ĝojigis kaj samtempe timigis min. Ja mi laboras en amasorganizaĵo kaj, se mi ne povus amasigi la societanojn por kunveno, tio tutcerte estos fiasko miaflanke. Sed mi ekiru de la komenco!


Venis la tempo de renovigo en nia asocio. El ĉiuj E-societoj oni faris po kelkajn novajn, laŭ la principo de la nova administra disdivido de Sofio je komunumoj. BEA-estraro asertis, ke la E-societojn oni dispecitigas tiel, por ke estu en ĉiu komunumo E-rondo, kie oni povas kuniĝi, interparoli, agi. Sed ŝvebis onidiroj, ke la transformiĝo estis elpensita speciale por gajni kromajn prezidanto-postenojn, ĉar nur tre maljunaj kaj kadukaj anoj ne sopiras estiĝi prezidantoj. Sed ni dividiĝis je tri: je komunumoj „Lozenec“, „Sredec“ kaj „Triadica“. La membrantaj en „Sredec“ foriris, trovis trionon de alia societo, unuiĝis kaj ekfunkciis nova E-societo. En „Lozenec“ oni ne sukcesis elekti estraron (kiel tio okazis estas profunda sekreto). Kaj en „Triadica“ la aferoj ekmarŝis tradicie de la fondiĝo de la nova malpli granda societo. La fandan kunvenon ĉeestis 11 personoj (el pli ol 100 invititoj). Post unu monato la elektita sekretario sendis al mi skriban mesaĝon, ke pro familiaj kaŭzoj ne povas agi, ĉar transloĝiĝas en vilaĝon. Malsaniĝis la kasistino kaj la infano de la respondeculino pri instruagado, pro kio ili ambaŭ longan tempon forestis. Restis la respondeculino pri kulturaj aranĝoj kaj mi. Kion ni faru duope?

Dissenditaj leteroj pri kunveno restis sen reago flanke de la societanoj. Denove sama resonon. Fine, kelkaj personoj ekinteresiĝis rezulte de regulaj telefonvokoj kaj ni kunvenis.

Depost tiam pasis jam kelkaj monatoj. Mi kredas, ke ekmarŝis iom post iom la afero, sed tre malfacile, penige. Tio, kompreneble ne estas nur pro la tradicio. La plimulto de la membroj de nia societo estas tre maljunaj. Ili volonte pagas sian membrokotizon, sed petas min ne igi ilin ĉeesti kunvenojn (kiuj okazas nur foje en la monato).

Nun mi profitas la okazon memorigi al ĉiuj, kiuj membras ĉe ni, ke E-societo „Kosta Penev“ okazigas regule kunvenojn ĉiun antaŭlastan ĵaŭdon de la monato en la klubejo ĉe str. „Knjaz Boris I“ N 66 je la 18.30 horo.

Veneta BALEVA,
prezidanto de societo
„Kosta Penev“ — komunumoj
„Triadica“ kaj „Lozenec“



Dum la festa oka-marta koncerto gratulojn al sofiaj esperantistoj prezentis eta Maria Georgieva kaj operkantisto Todor Atanasov

Foto: Veneta BALEVA



ESPERANTISTOJ PRI 21-A JARCENTO

Okaze de la 100-jara jubileo la Internacia Lingvo Esperanto, en novembro 1986 mi komencis korespondadon kun esperantistoj el Bulgario kaj eksterlando, kiujn mi petis respondi al jenaj demandoj:

1. *Kion vi opinias pri la historia sorto de la homaro dum la venonta 21-a jarcento, tuzante la problemojn pri paco, ekologio kaj teknika progreso?*
2. *Via opinio pri Esperanto, kiel ilo por interkompreniĝo de la popoloj, kaj ĝia sorto dum la venonta 21-a jarcento?*
3. *Ĉu vi konas Bulgarion kaj ĝian popolon, kaj kion vi opinias pri ili?*
4. *Bonvolu priskribi la plej interesan momenton el via vivo, ligitan kun Esperanto.*
5. *Rakontu pri viaj laŭdo kaj popolo.*

Ĝis nun mi ricevis pli ol 30 respondojn al tiuj demandoj inkluzive de plej gravaj funkciuloj kaj agantoj de nia movado. Inter ili estas la prezidanto de UEA profesoro d-ro H. Tonkin, la prezidanto de MEM d-ro Imre Pethès, d-ro Detlev Blanke, GDR, profesoro Vasil Peevski (Bulgario), s-anino Märtha Andreasson, s-ino Saulcerite Neilande (USSR-Latvio), f-ino Irene Sosnoski (GDR). El Bulgario partoprenis tiun enketon ankaŭ la honora prezidanto de MEM — Nikola Aleksiev, la eksa prezidanto de BEA Ĥristo Gorov, docento Georgi Dimov el Varna, Stojan Kostadinov, Neno Janev, Cvjatko Todorov, Dimitâr Mutușev, Jordan Kalinov, Petko Arnaudov k. a. Kompreneble mi ne povas citi la nomojn de ĉiuj partoprenintoj en la enketo.

La ricevitajn respondojn mi povas dividi en du partojn. Tiuj, kiuj alvenis antaŭ la unua Renkontiĝo inter M. Gorbaĉov kaj R. Reagan — la gvidantoj de la plej grandaj ŝtatoj, kaj post tio. La respondoj antaŭ la Renkontiĝo enhavas maltrankvilon pri la estonto de la homaro. Ekzemple, d-ro Detlev Blanke skribas: „La homaro nun troviĝas antaŭ la decido aŭ komune venki la militdanĝeron, aŭ komune pereii sendepende de politikaj konvinkoj“. S-ino Saulcerite Neilande el Latvio: „La homaro nun staras

antaŭ tre grava demando — esti aŭ ne esti, vivi en paco aŭ pereii“. S-ino Märtha Andreasson el Svedio: „Mi timas pri la sorto de la homaro. La grandpotencoj tenas ĝin en fajna fadeno. Miskompreno iamaniere, premo de la butono kaj nia tuta civilizacio pereos. La homoj pereigos sin mem, se ni, malpotenculoj, ne faros ion por defendi nin kontraŭ la minaco“.

Tre interesaj kaj altvaloraj estas la respondoj de la prezidanto de UEA profesoro d-ro H. Tonkin. Mi volas citi laŭvorte lian respondon al la unua demando: „La daŭrigo de nia prospero, eĉ nia kolektiva vivo en la 21-a jarcento, dependas unuavice de nia kapablo mastrumi la fizikajn rimedojn de nia planedo — la konservado de pura, sana produktiva ĉirkaŭaĵo. Duavice ĝi dependos de nia kapablo egalece disdividi tiun riĉecon inter la homoj kaj popoloj de la mondo, en spirito de paco kaj kompreniĝo. Nur en la plej vasta senco tio estas ideologia demando: ni devas superi niajn ideologiajn diferencojn por atingi interkonsenton pri plej esencaj demandoj.“

Al la dua demando la prezidanto de UEA respondas: „Ju pli multe necesas interkompreniĝi aktive por atingi tiun internacian interkonsenton en spirito de egaleco,

des pli multe oni bezonas Esperanton". Kaj respondante al mia kvara demando, li substrekas, ke li havas tre agrablajn sentojn pri la bulgara popolo, kaj la bulgara Esperanto-movado.

La respondoj, kiuj alvenis post la renkontiĝo inter M. Gorbaĉov kaj R. Reagan esprimas ĝojon kaj certecon pri la paca estonteco de la homaro. Jen la respondo de la prezidanto de MEM d-ro Imre Pethès: „Mi jam longe estas pacbatalanto kaj mi, estas konvinkita, ke en la mondo venkos la realisma politiko, kaj pere de ĝi oni povos certigi la pacon... Multon helpas al la nuntempa porpaca agado, ke inter la plej grandaj ŝtatoj okazis pintrenkontiĝo, kie la estroj en gravaj demandoj povis interkonsenti.”

La honora prezidanto de MEM Nikola Aleksiev donas detalajn respondojn al la starigitaj demandoj, li substrekas, ke en la mondo aperis „nova pensado, kiu jam obsedis la plej vastan parton de la homaro.” Li ankaŭ emfazas, ke la homaro devas pli obstine daŭrigi la batalon por paco, kaj por savo de la homaj civilizacio kaj kulturo. Por atingi la celon — pluan disvastigon de Esperanto, kaj ĝian pli amasan utiligon en la internacia vivo — ni devas utiligi ĉiujn nunajn formojn de laboro de esperantistoj kun diversaj, sed unuigitaj de nia komuna celo — la venko de pacamaj fortoj.

La eksa prezidanto de BEA Ĥristo Gorov antaŭvidas, ke dum la venonta 21-a jarcento la loĝantoj de la Tero ege plimultiĝos, kaj por ekzisti ili devas akceli la evoluon de la sciencteknika progreso, inventi pli perfektajn robotojn por la industrio kaj la agrikulturo, garantii amasan aplikadon de la cibernetiko, prizorgi la medio- protekton, batali kontraŭ novaj malsanoj.

Plue Ĥristo Gorov skribas: „Por ke Esperanto estu akceptita kiel universala lingvo, ĝiaj adeptoj devas pruvi al la ekstera mondo, ke ĝi taŭgas esti tia.”

Respondante al la starigitaj demandoj, docento Georgi Dimov el Varna esprimas sian optimismon, „ĉar la starigitaj horizontoj heliĝas post la 8-a de decembro 1987, kiam la ĝenerala sekretario de KPSU M. Gorbaĉov kaj la prezidanto de Usono

R. Reagan subskribis unikan dokumenton kun tre grava signifo por ĉiuj popoloj... Antaŭ cent jaroj sur la terglobo estis unu sola esperantisto — L. L. Zamenhof, kaj nun ne estas loko sur nia planedo, kie ne estas esperantistoj — skribas docento G. Dimov. Ni esperu, ke dum 21-a jarcento oni enkondukos Esperanton en ĉiujn lernejojn en la tuta mondo, ĉar la manko de komuna lingvo estas granda obstaklo al komunikado. Ĝi malhelpas la laboron por paco”.

La esperantisto-veterano Dimităr Mutuŝev skribas, ke li vidas la estonto de Esperanto hela, kun belegaj perspektivoj. Li substrekas, ke jam aperas la ideo pri Komuna „Eŭropa domo” kaj eĉ pri „Planeda domo”. Por tia domo, kompreneble, necesas komuna lingvo. Tiu lingvo estas preta, ĝi estas Esperanto.

Tre interesajn respondojn al la starigitaj demandoj donas ankaŭ la esperantistoj-veteranoj — Stojan Kostadinov, Neno Janev, Jordan Kalinov, Cvjatko Todorov kaj Petko Arnaudov el Bulgario, d-ro Werner Bormann el FRG, Jan Jicinski — merita matematikisto el ĈSSR, ĵurnalisto Vasilij Stanoviĉ el USSR, Ladislav Bala el ĈSSR, Irene Sosnoski — instruistino el GDR k. a.

Ili ĉiuj substrekas sian kredon pri la paca estonto de la homaro, maltrankvilĝas pro malpurigo de la natura medio, kaj esperas, ke Esperanto fariĝos dua lingvo por ĉiu homo en la mondo.

Ĉiuj eksterlandaj esperantistoj skribas plej belajn vortojn pri nia popolo, kaj montras la grandan prosperon de nia lando.

Mi volas esprimi mian grandan dankon al ĉiuj partoprenintoj en la enketo. Iliaj respondoj restos kiel valoraj dokumentoj por la esperantista generacio, kiu venas post ni.

Ĉar la alvenintaj ĝis nun respondoj enhavas altvalorajn opiniojn pri la estonto de Esperanto, mi turnas min al ĉiuj esperantistoj el Bulgario, kaj el eksterlando, kiuj nun ne respondis al miaj demandoj, doni siajn respondojn, sendante ilin laŭ adreso:

Penjo G. STOJANOV,
str. „Lenin” 31-a
6300 Ĥaskovo



Angulo por komencantoj

Karaj legantoj,

Lastatempe la nombro de niaj abonantoj komencantoj, kiuj regule ricevas kaj legas revuon „Bulgara Esperantisto” multe kreskis. Ĝin legas multaj novaj esperantistoj, kiuj tute ne konas aŭ ĵus komencis lerni Esperanton aŭtodiidakte.

Por ili ni destinas la novan rubrikon „ANGULO POR KOMENCANTOJ”. En ĝi ni aperigos malgrandajn artikolojn, ra-

kontojn kaj diversspecajn legaĵojn kun interesa, instrua kaj edifa enhavo, kiuj certe vastigos kaj profundigos la komencan lingvoscion. Kiel bazo de niaj tekstoj servos 500 E-radikoj, kiujn plej ofte oni uzas en Esperantaj libroj kaj gazetoj.

Estas bonvenaj viaj opinioj, konsiloj kaj sugestoj pri la nova rubriko. Ni atendas viajn leterojn.

LA REDAKCIO

Jinzo — vestaĵo de la junularo

KIEL LA FABELO ESTIĜAS VERO

Estis iu 18-jara junulo. Lia nomo estis Levi Strauss. Li loĝis en bavara urbeto Buttenheim (Germanio). Lun tagon li decidis serĉi sian bonŝancon¹ en la „Nova Mondo”. En 1847 lia patrino, gefratoj kaj li veturis per ŝipo al Nov-Jorko. Du liaj pli aĝaj fratoj jam delonge loĝis tie kaj komercis² per ŝtofoj.

Pasis tri jaroj. Venis la jaro 1850. La homoj estis en orfebro³. Ili migris⁴ al Okcident-Usono por serĉi oron. Ankaŭ Levi Strauss veturis al Kalifornio. Tamen li trovis alian „oran vejnon”⁵: brunan vel-tonon⁶. Tiun fortikan ŝtofon li ekvendis al or-serĉistoj por tendoj⁷ kaj ŝirma tolo por veturiloj.

KOMENCE OKAZAS ALIE...

La or-serĉistoj bezonis firmajn vestojn, fortikajn pantalonon, kiujn longan tempom povas uzi. Do, Levi Strauss tajlorigis⁸ el vel-tolo pantalonon. Ili estis ĝuste bezonataj al la krudaj⁹ viroj. Ĉiuj ekvolis aĉeti „Levi's”-pantalonon. La entrepreno¹⁰ prosperis. Baldaŭ la saĝa entreprenisto produktis ŝirmkostumojn¹¹ el kotonŝtofo „Serge de Nîmes”.

SED JINZO PROSPERAS

La angla vorto jeans (jinzo)¹² ekzistis jam en la 16-a jarcento. Inter 1960 kaj 1870 jeans estas

menciita unufoje en la usonaj tag-jurnaloj¹³ kiel blue jeans (blua jinzo).

Iu kurbgamba¹⁴ or-ĉasisto havis „kulpon” pri apero de nitoj¹⁵. Oni nomis lin Alkali Ike. Lun tagon li denove devis plendi ĉe tajloristo Davis. Ĉiam, kiam li ŝovis sian „oron” en la ĵinzopoŝojn, ili ŝirigis. Li koleris pro tio kaj furiozis¹⁶. Tiam Davis prenis martelon kaj kunligis la angulojn de la poŝoj per kupro¹⁷-nitoj. Levi Strauss aĉetis en 1872 tiun eltrovaĵon kaj registris ĝin en 1873 kiel patenton¹⁸. Pro tio la Levi's-pantalonon estis multajn jarojn la solaj kun nitoj.

KAJ LA FINO DE LA HISTORIO

En 1890 Strauss fondis firmaon „Levi Strauss & Co.”. La blua laborpantalono estis konkursanto kaj Levi Strauss perlaboris tre multe da mono. La bavaro mortis en 1902 en Usono, sed la ĵinzoj faris frenezan¹⁹ karieron en tuta mondo...

KOMPREENBLE, EN JINZO!

Jinzo — la pantalo de or-serĉistoj, vakeroj²⁰ kaj laboristoj — estiĝis praktika ĉiutaga vestaĵo. Jinzo venis en modon en la 50-aj jaroj: la idoloj de la junularo en tuta mondo — usonaj film- kaj popsteloj Marylyn Monroe, Marlon Brando, Elvis Presley k. a. aperis en ĵinzo. Ĝi signifas aventuron, liberon kaj proteston. La gejunuloj volas

esti aliaj ol siaj gepatroj, travivi sian novan memkonscion²¹ ankaŭ aŭ ĝuste en la vestoj. Ili estas junaj kaj ŝatas bluan ĵinzon en ĉiuj vivsitacioj.

Jinzo estas vestaĵo de lernantoj kaj studentoj, de militkontraŭuloj, de „verduloj”, de demonstraciintoj, de hipioj... Jinzo estas vestaĵo de la junularo!

Evgeni GEORGIEV

1. bona ebleco de sukceso. —
2. interŝanĝi, aĉeti kaj vendi. —
3. forte emocia ekscitiĝo pri oro. —
4. iri de iu loko al alia. — 5. (fig.) profitodona afero. — 6. ŝtofo el lino. — 7. portebla subĉiela loĝejo el dika tolo. — 8. igi kudriston kunligi ŝtofon per fadeno. —
9. maldelikata. — 10. prenita sur sin afero. — 11. kostumo kontraŭ malbonaj klimataj kondiĉoj. —
12. fortika kotonŝtofa pantalo. —
13. ĉiutaga grandformata periodaĵo. — 14. nerekta suba membro de homa korpo. —
15. cilindra metalpeco por firma kunligo. 16. ege kolera. —
17. brunruĝa peza metalo. —
18. dokumento pri inventaĵo. —
19. perdinta la prudenton. —
20. rajdanta gardisto en Nord-Ameriko. — 21. senpera scio pri siaj psikaj fenomenoj.

MALPROKSIMA INSULA GASTO

Mia kara gasto en aŭgusto pasintjare estis mia malnova korespondamiko Andrianirĥnahrivelo Samoela Rakatavahaoka Viktor Laia el la malproksima sud-afrika insulo Madagaskaro. Nin kunligas pli ol 12-jara korespondado, kiu komenciĝis franclingve, sed miaj interesaj rakontoj pri diversaj E-aranĝoj vekis lian intereson al la Internacia Lingvo. Ĝin profundigis la fakto, ke la patro de Samy, doktoro pri teologio, S-ro Pol Rakatavahaoka, antaŭ multaj jaroj lernis Esperanton kaj ĵaluze gardis en sia biblioteko flaviĝintan libreton — franca lernolibro de Esperanto, eldonitan antaŭ pli ol 30 jaroj.


Kaj nun, kiam mia malproksima malnova korespondamiko doktoriĝas pri fotokemio en la universitato „Bler Paskal“ de la franca urbo Klermont Ferrand, ni havis la feliĉan eblecon renkontiĝi por la unua fojo, sub la suna ĉielo de nia gastama lando.

Dum sia restado en Bulgario Samy havis eblecon konatiĝi kun nia popolo, kun nia riĉa 13-jarcenta historio kaj kun la belaj popolaj tradicioj, kun multaj vidindaĵoj kaj monumentoj... Li traveturis nian landon de la sudokcidenta ĝis la nordorienta ĝia parto, vizitante la urbojn Sandanski, Melnik kaj Roĥen-monahejon, Pleven, V. Târnovo, Opaka, Popovo, Târgoviște, Razgrad, Tolbuĥin, Balĉik, Varna...

Protitinte la eblecon pliriĉigi siajn konojn pri nia amika lando, mia gasto fotis ĉiujn vizititajn vidindaĵojn kaj skribnotis detalajn informojn. Lin ravis la senkompara beleco de la Melnik-arkitekturo, la bulgara ikonografia arto, la dankemo de la nuna Plevana generacio al la liberigintoj, la majesta „Carevec“ kaj la impona patriarkejo en Veliko Târnovo, la moderna vizaĝo de Tolbuĥin kaj la monumento de ĥano Asparuĥo, la ĉarma botanika ĝardeno en Balĉik, la alloga nigramara urbo-belulo Varna...

Neforgeseblajn rememorojn mia gasto gardas pri Sofio kaj ĝiaj muzeoj kaj monumentoj. La vizito al la Nacia Historia Muzeo lasis plej profundajn spurojn en lia koro. Sofio forte impresis lin per sia arkitekturo kaj la verdaj belaj parkoj kaj floriĝardenoj.

La vizito al la redakcio de revuo „Paco“



Antaŭ la monumento de la fondinto de nia ŝtato ĥano Asparuĥ en urbo Tolbuĥin

kaj la konatiĝo kun ĝia ĉefredaktoro V. Oljanov alportis grandan ĝojon kaj kontentecon al Samy.

Kiel muzikisto kaj komponisto, li havis bonan eblecon kontentigi sian grandan intereson, konatiĝinte kun la bulgara muzika trezoro. Forte emociis lin la anĝelvoĉa muziko de nia mondfama ĥoro „Joan Kukuzel“ kaj la belsonaj folkloraj kantoj el diversaj regionoj de nia lando.

Nia renkontiĝo alportis grandan ĝojon al ni ambaŭ kaj estis vera esprimo de nia bona E-amikeco.

Antoaneta NIKOLAEVA



POETO VIGLA KAJ KONSCIA

Li ne estas produktema aŭtoro, li tre malofte publikigas siajn verkojn kaj jen pro tio li ankoraŭ ne estas sufiĉe konata eĉ en la malriĉiĝinta lastatempe stelaro de la bulgaraj Esperanto-poetoj. Kaj tio ĉi estas bedaŭrinda fakto, ĉar li havas kion diri kaj jam pruvis, ke scias kiamaniere plej bone diri ĝin.

Nikola Pilev estas naskita en 1937 en vilaĝo Gorski izvor, distrikto de Ĥaskovo. Li finis Superan Ekonomian Instituton en Varna. Esperantisto de 1960. Lektoro de Esperanto de 1963. Membro de CE de BEA ekde 1966. Pilev publikigis originalajn kaj tradukitajn versaĵojn en Esperanto en „Bulgara Esperantisto“.

Lia poezio estas esprimo de vigla civitana kaj krea konscio, kiu emociigas pri la problemoj de la nuntempo. Por li la poezio estas socia tasko, armilo, kiu helpas la proksimiĝon de la revata mondo de libero, frateco kaj feliĉo.

En la verkoj de Pilev estas nenio hazarda, senenhava, servanta nur kiel poezia farĉo rilate la rimon aŭ la verspiedon, kio, bedaŭrinde, estas ne malofta aperaĵo en la nuntempa Esperanto-poezio.

Distinga trajto de lia stilo estas la strebo al direkta sugesto de la ideo. Tamen lia poezio ne estas deklara. Ĝin karakterizas freŝeco de la percepo kaj originala bildeco — viva esprimeco, lakoneco, impeta ritmo. Liaj poemoj enhavas tranĉajn demandojn kaj respondojn, ŝultajn turniĝojn de la tononuanco, esprimplenajn paŭzojn.

Pli grandan parton en la krea agado de Pilev okupas la tradukado de bulgara poezio en Esperanton. Li estas kunmetinto kaj kuntradukinto de la poemaro „Homoj, antaŭen!“ de Penjo Penev (1986), redaktoro de la poemaro „Milda fifro jam eksonis“ (1986), kuntradukinto de la poemaro „Elektitaj versaĵoj“ de Nikola Vapcarov (1987), kuntradukinto de la literatura antologio „Nesto de birdoj“ (1987) kaj kuntradukinto de „De bordo al bordo“ de Elisaveta Bagrjana (1988).



Pilev estas unu el la vivaj konfirmoj de la jam konata vero, ke bona tradukisto de poezio devas esti mem bona poeto. Fideleco al la originalo por li signifas ne laŭvortan tradukon de unuopaj vortoj kaj esprimoj, sed fidelecon al la spirito de la verkaro de tiaj poetoj kiel Nikola Vapcarov, Penjo Penev k. a., al ties stila specifikado, kondiĉita de ilia individua poeta vidado.

Mi kredas, ke eŝtonte Nikola Pilev ĝojigos nin per novaj bonegaj originalaj versaĵoj kaj tradukoj de poezio.

Venelin MITEV

NIKOLA PILEV

RENKONTIĜO SONGE

*Vi estas sinjoro Grabowski? Bonvenon!
Vi kiel forlasis malvivon obskuran?
Bonvolu sidiĝi! Ho, jes, mi komprenas —
la stelojn neniam obstaklas la muroj!*

*Verŝajne vi ade la Majstron vizitas
kaj legas laŭtvoĉe „Sinjoron Tadeon“,
kaj kune komentas pri l' gut' kaj granito?
Bonvolu! Ĉu trinkos vi tason da teo?*

*Vi staras senmove kaj mute demandas:
Ĉu inde daŭrigas ni vian aferon?*

Dediĉe al Antoni Grabowski

*La dorĝoj survoje ankoraŭ ne mankas,
ni tamen ne perdas la verdan esperon.*

*Sincere dirite, ni devas konfesi,
nin ofte atakas internaj malordoj.
Sed nia marŝado antaŭen ne ĉesas,
konkorde sonoras plimulto de l' kordoj.*


*La mond' paŝ'-post-paŝe la lingvon agnoska
la nepoj adore „la patro“ vin nomas.
„Tagiĝo“ radias, sinjoro Grabowski,
kaj via animo en ĝi rave sonas!*

NASKIĜAS NOVAJ MOROJ

*La mondo bolis en preparo
por la venanta Nova Jaro,
rigarde al donacoj
kaj dorse al minacoj.
Sed kiel ondo
trairis mondon
novaĵo ŝoka
kaj provoka:
eksplodis tragedio*

*en frata Armenio —
ekstrema
tertremo!
Kaj restis multaj homoj
sub la falintaj domoj
Kruela sorto —
la hom' senfortas.
Sed tamen en la horo
de dramo kaj hororo,*

*de ploroj kaj turmento
montriĝis iu nova sento.
La mondo kunsuferas
spontane kaj senpere —
jen, sendas multaj landoj
medikamentojn, tendojn, sangon,
savantojn kaj valuton
kun varma korsaluto...
Naskiĝas io sankte kara:
la novaj moroj de l' homaro!*



Grafikaĵo: Anton PETKOV

ANTAŬ DISIĜO

*Maldormas la espero lasta
kaj korajn vundojn zorge vindas.
La lumon iu kaŝis draste,
aŭ ni fariĝis simple blindaj.*

*Verŝajne la finalo venos,
ni ĝin obeu sen bedaŭro.
Alie, kiel ni komprenos,
la ĉarmo kiomlonge daŭras.*

ALVOKO

*Ho, veteranoj kaj novicoj,
surporde ofte frapas falso,
kun masko nobla, senmalica,
kantante ŝajne verdan valson.*

*Ĉu konstrueblas iu turo
per ŝtonoj de disput' malpaca?
Ĉu kreskos alten la staturo,
se ĝin katenas kara paco?*

*Bezonas nia id' logika
ne tromemfidon sinforĝesan,
nek fermon preskaŭ hermetikan,
sed vaston mondan kaj kareson.*

*Malfermu pordojn ni al helo
de la tagiĝo renoviga!
Purigu ni la rustajn stelojn
kaj iru sur la voĵ' kunliga!*

Biografia divenludo pri pioniro de nia movado

Tiu ĉi divenludo konsistas el dudek informoj pri unu el la plej gravaj pioniroj en la historio de la Esperanto-movado. La faktoj estas aranĝitaj laŭ kronologia ordo kaj prezentas biografian skizon pri la koncerna persono. Provu diveni, pri kiu temas. Se vi sukcesos, antaŭ ol atingi la kvinan informon, vi ricevos eminentan noton pro via scio pri la historio de Esperanto. Vi rajtas rigardi vin tre bone informita esperantisto, se vi trafe nomos lin inter informoj 5 kaj 10. Eĉ se vi bezonas 15 helpilojn, vi meritas laŭdon. Tiuj, kiuj ĝis la dudeka informo ankoraŭ ne povas identigi la viron, ne estu malkontentaj; ili konsolu sin, sciante, ke ili lernis novajn faktojn pri la frua historio de Esperanto.

1. Li naskiĝis la 22-an de januaro, 1839, en Heide/Essen, Vestfalia, Germanio. Lia patro estis ministo, kaj li mem komencis labori en minejoj kiel junulo. [Inter sia 6-a kaj 14-a jaro li frekventis katolikan elementan lernejon. Dum sia juneco en la kamparo li estis absorbita de ultramontanaj* ideoj; en postaj jaroj lia kompreno pri publikaj aferoj pliprofondiĝis, kaj li aliĝis al liberala partio. Li apartenis al malnovkatolikoj kaj inter ili al la plej liberaj.]

* *ultramontana* — En la romkatolika eklezio, rilatanta aŭ favore al pli granda aŭ absoluta aŭtoritato de la papo koncerne aferojn de kredo kaj disciplino, super la aŭtoritato de civilaj kaj diocezaŭtoritatoj en la propra lando; rilatanta al papeca partio; papana.

2. Dum li laboris en minejoj, li samtempe dediĉis sin al plua edukado, precipe rilate minej-teknologion. Li edziĝis en 1868 kaj ses jarojn poste, en 1874, li sukcesis trapasi ekzamenon por akiri atestilon de termezuristo.

3. Li interesiĝis pri la internacilingva demando kaj fariĝis adepto de Volapuko. Kiam la volapukista Mondlingva Klubo el Nurenbergo decidis akcepti Esperanton en 1888, ankaŭ li komencis lerni la novan lingvon.

4. Lia nomo estas en la unua adresaro de esperantistoj, eldonita en 1888. En la sekva jaro aperis en la novembra numero de la unua esperantista gazeto, **La Esperantisto**, letereto verkita de d-ro Zamenhof, salutanta lin. Tiutempe li loĝis en Schalke kaj fondis lokan grupon tie en 1890.

5. En 1891 li eldonis en Nurenbergo, je propra kosto, lernolibron de Esperanto por germanoj (**Die Weltsprache „Esperanto“, vollständiges Lehrbuch**), kaj en la sekvaj jaroj li aperigis aliajn lernilojn.

6. **La Esperantisto** havis financajn problemojn pro manko de abonantoj, do li proponis „Akciajn Projekton“ por eldonado de la gazeto kaj ankaŭ de malmultekostaj libroj. La afero fiaskis, ĉar nur malmultaj esperantistoj volis apogi ĝin kaj aĉeti akciojn.

7. Kvankam Zamenhof anoncis la ĉesigon de **La Esperantisto** en la lasta numero de la jaro 1891, li povis samtempe sciigi la legantaron, ke „dank’ al la helpo de unu el niaj amikoj la estonteco de nia afero estas nun certigita“. La germana mineja termezuristo prenis sur sin la financan

respondecon pri la eldonado de **La Esperantisto**, subvencianta ĝin kaj ankaŭ destinante monatan salajron al d-ro Zamenhof por la redakta laboro.

8. En 1892 li eldonis germanan-Esperantan vortaron kaj komencis dediĉi sin al propagandado, aperigante anoncojn en gazetoj kaj dissendante Esperanto-literaturon je tre malalta prezo. Krome, li akiris monon per vendado de poŝtmarkoj.

9. Dum la periodo 1891—1894 reformemuloj komencis agiti por ŝanĝoj en Esperanto. Ankaŭ li postulis modifojn en la lingvo, kvankam ne tiel drastajn kiel tiujn proponitajn de aliaj. Ekzemple, li volis anstataŭigi „kaj“ per „e“, „s“ ĉe la komenco de silaboj per „z“ (ekzemple ne „sablo“, sed „zablo“), forigi la difinan artikolon, kaj uzi nur unu finaĵon, „-a“, por adjektivoj kaj adverboj.

10. En letero de 1894 al rusa esperantisto, Zamenhof skribis jene: „En la fino de la jaro 1893, s-ro [...] sciigis min, ke se mi ne elpaŝas persone kun radikalaj reformoj, li ĉesos eldonadi la gazeton...“

11. La voĉdonado pri reformoj okazis en 1894, sed antaŭ la limdato, li anoncis, ke lia subteno de la gazeto ĉesos ĉe la fino de la jaro.

12. D-ro Zamenhof fariĝis redaktoro-eldonanto de **La Esperantisto** en 1895 post la trijara subvenciado de la germana mecenato. Dum la sekvaj jaroj tiu ĉi daŭrigis sian poresperantan agadon kiel privata esperantisto.

13. En 1895 li tradukis germanlingven propagandan broŝuron verkitan de Zamenhof en la rusa lingvo: **Kurze Mittheilung über die internationale Sprache** (Mallonga Komunikaĵo pri la Internacia Lingvo).

14. En la gazeto **Lingvo Internacia** aperis en 1896 eltiraĵo el privata letero de

Zamenhof al la antaŭa subvencianto, en kiu Zamenhof detale pritraktis la demandon pri reformoj en Esperanto kaj la problemon de rivalaj planlingvaj projektoj.

15. En 1896 la termezuristo havis malfacilaĵojn en la minejo, kie li laboris, do li decidis ĉesi labori kaj vivi de siaj ŝparitaj rimedoj. Dum la sekvaj jaroj li vojaĝis en diversaj landoj de Eŭropo kun la celo interrilati kun esperantistoj.

16. Li iris al Usono en 1899 kaj la sekvan jaron renkontiĝis kun Richard Geoghegan, brita pioniro de Esperanto, kiu tiutempe loĝis en la ŝtato Ŭaŝingtono. Laŭdire, la unua persono, kun kiu Geoghegan parolis Esperante, estis tiu ĉi vojaĝanto el Eŭropo.

17. Reveninte al Eŭropo en 1900, li faris planon viziti Parizon kaj proponis organizon de esperantista kongreso en tiu urbo. Li anoncis, ke li estas preta financi tiun projekton.

18. Post longa malsano li mortis en Essen, Germanio, la 7-an de novembro 1901, en la aĝo de 62 jaroj.

19. En nekrologo pri li, kiu aperis en **Lingvo Internacia** en 1901, Zamenhof skribis: „En la historio de Esperanto al vi apartenas ĉiam la plej grava, neniam elŝirebla, neniam elstrekebla paĝo!“

20. Zamenhof denove menciis lin en sia parolado ĉe la unua Universala Kongreso en Bulonjo-ĉe-maro en 1905: „... mi parolas pri la neforgesebla... Neniam parolante pri si; postulante por si nenian dankon, li prenis sur siajn ŝultrojn nian tutan aferon, kiam ĝi troviĝis en la plej malfacilaj cirkonstancoj; li sola subtenadis ĝin tiel longe, ĝis la nombro de la esperantistoj fariĝis sufiĉe granda, por subtenadi la aferon per fortoj komunaj. Kiel li ĝojus nun, se li vidus la nunan staton de nia afero!“

Bernard GOLDEN

La respondo al la demandaro troviĝas sur pĝ. 24.


I R A S V O J A Ğ A N T O J

VORTOJ, MUZIKO

IVAN IVANOV



JOI-DI-RI-DI-RI, E-ĤO, JOI-DI-RI-DI-RI, E-ĤO, JOI-DI-RI-DI-RI,
JOI-DI-RI, JOI. 1. DI-MAN-ĤE KUN GRU-PO AL MON-TO AN-TAŬ-EN N
I-RIS KUN ĜOJ' KAJ KI-AM NI PA-SIS SUR PON-TO A-PE-RIS MON-
TO KAJ VOJ' KAJ -TA-RO KAJ VOJ'. JOI-DI-RI-DI-RI, E-ĤO,
JOI-DI-RI-DI-RI, E-ĤO, JOI-DI-RI-DI-RI, VE-NU ĤE NIN. 2. KAJ TI-E LA
BIR-DOJ EK-KAN-TIS FLU-GAN-TE, ĜU-AN-TE KUN NI; NA-TU-RON NI
BE-LAN RI-GAR-DIS KAJ SU-NO ĜOJ-BRI-LAS POR NI, NA- BRI-LAS POR
NI. JOI-DI-RI-DI-RI, E-ĤO, JOI-DI-RI-DI-RI, E-ĤO, JOI-DI-RI-DI-RI,
VE-NU ĤE NIN. 3. FLU-GAS, FLU-GAS KAN-TO - NI-A
KUN- I- RAN-TO, FLU-GAS, FLU-GAS KAN-TO - I-RAS VO-JA-
ĜAN-TOJ. JOI-DI-RI-DI-RI, E-ĤO, JOI-DI-RI-DI-RI, E-ĤO,
JOI-DI-RI-DI-RI, VE-NU ĤE NIN, ĤE NIN, E-ĤO, E-ĤO!



„Venu kun ni!“

Foto: Ivan SALABAŜEV

IRAS VOJAĜANTOJ

*Dimanĉe kun grupo al monto
antaŭen ni iris kun ĝoj'
kaj kiam ni paŝis sur ponto
aperis montaro kaj voj'.*

*Kaj tie la birdoj ekkantis,
flugante, ĝuante kun ni;*

*naturon ni belan rigardis
kaj suno ĝojbrilis por ni.*

*Flugas, flugas kanto —
nia kuniranto.*

*Flugas, flugas kanto —
iras vojaĝantoj.*

Tiu gaja kanto naskiĝis en turista grupo „La gajaj vojaĝantoj“ kaj estis plenumita de kantgrupo „La verda fiakro“ por unua fojo dum la pasintjaraj turistaj Esperanto-tagoj en Sofio, Bulgario.



Jam 100 jarojn bulgaraj filatelistoj agadas organizite kadre de sia oficiala filatela asocio kaj ĝuas grandan aŭtoritaton mondscale. Pruvo pri tio estas la aprobo de Bulgario, fare de la Internacia Filatela Federacio (IFF), esti gastiganto de internaciaj filatelaj ekspozicioj „SOFIO'69“, „FILASERDIKA'79“, samkiel de internaciaj junularaj filatelaj aranĝoj „JUNECO'74“ kaj „JUNECO'84“. Ili ĉiuj montris la altan nivelon de la bulgara filatela movado kaj grave kontribuis al prifortigo kaj disvastigo de althumanaj pacaj celoj kaj taskoj de la Internacia Filatela Federacio. Ĉio ĉi multe influis la decidon de IFF, ke la sekva Internacia Filatela Ekspozicio — „BULGARIO'89“, kaj ĝia 58-a kongreso okazu en

nia lando de la 22-a ĝis la 31-a de majo 1989.

Tiuj du gravaj internaciaj aranĝoj, kies devizo estas „La filatelo — por paca mondo“, okazos en la salonegoj de la Popola Palaco de Kulturo en Sofio sub la alta aŭspicio de la Prezidanto de la Ŝtata Konsilantaro de PR Bulgario Todor Ĵivkov. La Internacia Filatela Ekspozicio „BULGARIO'89“ estas dediĉita al la 110-jariĝo de la poŝtistaj komunikoj kaj al la 100-jariĝo de organizita filatelista agado en nia lando.

Cele al bona organizo kaj okazigo de tiu respondeca kaj grava internacia aranĝo funkcias Organiza Komitato kun prezidanto ministro pri la kulturo, scienco kaj klerigo Georgi Jordanov, kaj

Plenumkomitato kun prezidanto Konstantin Gabrovski — vicprezidanto de la Asocio de Bulgaraj Filatelistoj. Membroj de ambaŭ komitatoj estas reprezentantoj de Asocio „Komunikado“, de ministerioj, institucioj kaj sociaj organizaĵoj en Bulgario, kiuj montras viglan intereson al la ekspozicio. Ĉefkunordiganto estas Georg Lindberg el Svedio — vicprezidanto de IFF.

„La filatelo estas nobla agado. Ĝi provokas ĉe homoj helajn pensojn, kreas senton pri artaj kriterioj kaj beleco, pri humanismo, fido kaj amikeco, — substrekis ministro Georgi Jordanov en sia mesaĝo al la ekspoziciontoj. — De tio devenas la signifo de la filatelo ankaŭ en la internacia kultura interŝanĝo. Nuntempe la poŝtmarkoj ludas multe pli gravan rolon ol sia tradicia valoro de taksaj unuoj. Ili estas viva memoraĵo pri la pasinteco, spegulo de la vivo en diversaj periodoj de la homa historio. Ilia kolektado estas kontribuo al la evoluo de altkulturaj individuoj. Jen kio kredigas nin pri la sukceso de la Internacia Filatela Ekspozicio „BULGARIO'89“.

Tiuj pensoj de ministro Jordanov resumas la ĉefajn celojn de la ekspozicio — kontribui al la plua disvastigo de la internacia filatela movado sur ampleksa demokratia bazo por plifirmigo de amikaj interrilatoj kaj konatiĝo de filatelistoj el ĉiuj partoj de la planedo por paca kunlaborado kaj kompreniĝo.

Ekspozicio estos aran-
 ĝa sur spaco de
 10 000 m². Estos prezentitaj
 pli ol 1 000 eksponaĵoj-kolektoj de poŝtistaj administracioj el 158 landoj, de mondfamaj poŝtistaj muzeoj (USSR, Francio, Svedio, k. a.) kaj de filatelistoj el 67 landoj, membrantaj en IFF, distingitaj per „Granda Internacia Premio“ en la internaciaj ekspozicioj en Madrido, Stokholmo, Ĉikago, Kopenhago, Prago, k. a. Unuan fojon en Bulgario estos prezentita la kolekto de Ŝia Moŝto Elizabeto II, Reĝino de Unuiĝinta Regno de Britio kaj Norda Irlando.

Speciala Ĵurio sub la gvido de Ladislav Dvořáček el ĈSSR — prezidanto de IFF kiun konsistigas reprezentantoj el la gastiganta lando kaj el ĉiuj kontinentoj, prijuĝos premiojn al la plej valoraj kaj originalaj kolektoj.

Dum la tagoj de la ekspozicio estos organizitaj konkursoj, standoj kun diversspecaj filatelaĵoj, koncertoj, spektakloj, ekskursoj, ktp.

Jam estas eldonitaj kelkaj kolorafiŝoj, poŝtmarkoj kaj kovertoj kun speciala stampo.

Laŭ la informoj de Svetla Stratieva kaj Zora Oŝanska el la estraro de la Sekcio de esperantistoj-kolektantoj ĉe Bulgara Esperantista Asocio, bulgaraj filatelistoj-esperantistoj sin prezentos en la ekspozicio sub la devizo „Esperanto en la filatelo“ en tri apartaj sekcioj:

Ekspozicio de kolektoj el Esperantaj poŝtmarkoj; stampoj; speciale stampitaj

kovertoj kaj poŝtkartoj, leteroj, sigeloj k. a. Per propraj kolektoj sin prezentos niaj samideanoj Ivan Aleksiev, Maria Taŝeva kaj Georgi Litov el Sofio, Kiril Ĥlebarov el Petriĉ, Cvjatko Todorov el Ŝumen kaj aliaj filatelistoj-esperantistoj el la lando. Tiun ĉi ekspozicion eble partoprenos ankaŭ nia samideano Rudolf Burmeister el GDR.

Ĉe speciala stando estos vendataj Esperanta literaturo (bulgaraj kaj fremblandaj eldonoj), Esperantaj lerniloj kaj lerno-helpiloj, revuoj kaj esperantaĵoj.

Dum la ekspoziciaj tagoj funkcios Informa Servo, ĉe kiu interesiĝontoj povas ricevi informojn pri Esperanto, pri bulgara kaj internacia E-movado, k. a. Funkcios ankaŭ Klubo de Kolektantoj, kie fremdlandaj kaj bulgaraj vizitantoj povas interŝanĝi poŝtmarkojn, esperantaĵojn, starigi senperajn kontaktojn, amikiĝi.

La decido de la Organiza Komitato pri partopreno de filatelistoj-esperantistoj en Internacia Filatela Ekspozicio „BULGARIO'89“ estas pruvo pri ilia kontribuo al la monda filatelista movado, esprimo de estimo al la nobla agado de Bulgara Esperantista Asocio por pacdefendo, amikeco kaj interkompreniĝo inter la popoloj pere de la Internacia Lingvo Esperanto.

Al „BULGARIO'89“ kaj al niaj samideanoj-filatelistoj ni tutkore bondeziras sukceson!

Radi BANĈEVSKI

SPERANTISTO- ENTJARULO



Asparuh Ivanov naskiĝis la 3-an de januaro 1889 en urbo Harmanli, kie lia patro militservis. Poste la familio translokiĝas en Ĥaskovo, tie mortis la patrino. Kvin infanoj, ĉiuj knaboj, fariĝis orfoj. Post kelkaj jaroj la patro pensiigis kaj revenis en sian hejmurbon Kazanlâk. Tie pasis la infanaj kaj junulaj jaroj de Asparuh. En 1906 li finis la faman kazanlâkan pedagogian lernejon kaj fariĝis instruisto en iu vilaĝo en la regiono de Karnobat. Tie li instruis ĝis 1910. Poste oni oficigis lin instruisto en Kazanlâk, kie li instruis ĝis 1919.

Asparuh Ivanov partoprenis la Balkanan kaj la Unuan Mondmilitojn kiel ordinara soldato.

Post la fino de la milito Asparuh Ivanov revenis en Kazanlâk. Dezirante labori inter la popolo, li okupis instruistan lokon en vilaĝo Dâbovo, kazanlâka regiono. Kiel lernejdirektoro li laboris por la prospero de la eduka laboro. Preciza, akurata, sobra, postulema al si mem, tia memoras sian instruiston la vilaĝanoj el v. Dâbovo. Li estas ankaŭ bona dommastro en sia korto, kiu estis modela.

Kiel membro de la „rekvizicia komisiono“ dum la jaroj 1941—1944 A. Ivanov avertis la vilaĝanojn kaŝi la grenon, lanon, fromaĝon, kiujn la faŝistoj prenis por la germanoj.

La 9-an de septembro 1944 en la vilaĝo okazis mitingo. Oratoro estis Asparuh Ivanov, kiu anoncis la falon de la faŝismo kaj proklamis la aŭtoritaton de la Patrolanda Fronto.

Demandite antaŭ 20 jaroj kiel li fariĝis esperantisto, li skribis tre koncize siajn rememorojn:



Vidaĵo el Loveĉ — la arkitektura rezervejo „Varoŝa”

En la Unua Internacia Festivalo de Foto-Kinoamatoroj Esperantistoj, okazinta en Pisanica, 1985, Kiril partoprenis per originala serio de infanfotaj, pro kiu li gajnis duan premion. En la Dua ILEF-Festivalo en Vraca, 1988, la urba Esperanto-societo „Sukceso” aljuĝis al Kiril Kalĉev sian specialan premion pro lia kolekto de interesaj raportaĵaj fotaj. Sur la paĝoj de „Bulgara Esperantisto” kaj de aliaj niaj kaj fremdlandaj E-periodaĵoj ofte aperadas fotaj, kies aŭtoro estas Kiril Kalĉev.

De nia „verda rosmaro” kaj entuziasma fotisto-esperantisto ni atendas novajn originalajn kontribuojn, bondezirante al li fortan sanon kaj ĉiam scivoleman „verdan” objektivon!

Donĉo ĤITROV



Diplomo el Ĉinio

La multjara esperantisto Ilija Andreev, kiu estas unu el la elstaraj laboristoj en la Metalurgia Entreprenejo por Prilaborado de Alumino „St. Stamenov” en Ŝumen, estas konata kiel aktiva propagandanto de nia lingvo ne nur inter la membroj de la Klubo por Internacia Amikeco „Metalurgo” kaj de societo „Vekiĝo”, sed ankaŭ inter la gesamideanoj en multaj landoj. Li regule kaj pasie korespondas kun pli ol 30 geamikoj diverslandaj, partoprenas kun materialoj pri la historio kaj la beleco de nia lando en internaciaj ekspozicioj kaj diversaj konkursoj kaj tiamaniere gajnas novajn amikojn de Bulgario. Antaŭ du jaroj li verkis, tradukis esperante kaj helpe de aliaj membroj estis dissendita al dekoj da adresoj „Legendo pri la martenico”. Poste aperis laŭdoj ne nur en la E-gazetaro, sed ankaŭ en nacilingvaj tag-ĵurnaloj kaj gazetoj en Hungario, Svedio, USSR, Mongolio. La E-programoj de radiostacioj Varsovio, Vieno, Pekino, ankaŭ disaŭdigis tion.

Antaŭnelonge nova ĝojo tuŝis lin, lian familion kaj la ŝumenajn esperantistojn. El la Ĉina Popola Respubliko al li alvenis pakaĵo. Kaj en ĝi kune kun belega koltuko el la fama ĉina silko kaj aliaj memoraĵoj, oni ekvidis kaligrafe skribitan Diplomon. Ĝi estas al li prijuĝita pro aktiva partopreno en la anoncita dum 1988, „La jaro de drako”, konkurso de la E-redakcio de Radio Pekino, konkurso pri temo: Ĉinio en miaj okuloj”. Lia verko „Mi kaj Ĉinio”, en kiu li sincere kaj varme priskribas sian intereson al tiu malproksima kaj nekonata lando, jam — de siaj infanjaroj kaj la ligoj inter nia kaj la ĉina popoloj, estas distingita per tria premio el inter la dekoj da partoprenantoj alilandaj. Ĝi estas disaŭdigita en unu el la radioprogramoj.

Cvjatko TODOROV





INTERESA KAJ ĜOJA VIVO

En 1968 mi esperantiĝis kaj fariĝis membro de E-societo „Nikola Šopov” en Sofio. Prezidanto de la societo estis Ljuben Grozdanov. Li estas mia unua instruanto kaj kuraĝigis miajn unuajn paŝojn en Esperanto. En 1970 mi estiĝis kasistino de la societo, finis duan gradon kaj komencis korespondi kun kelkaj gesamideanoj eksterlandaj. Kun iuj de ili mi poste konatiĝis persone. Tio okazis dum niaj reciprokaj gastadoj. Plej regulan kaj longdaŭran korespondadon (jam dudek jarojn) mi havas kun la gesamideanoj Ulo Murakas el Tallinn, Christine Nagel el Dresden, Pereklis Ĉaušoglu el Tesaliko, Zuzana Petrovičova el Bratislava k. a. La ricevado de eksterlandaj leteroj feliĉigis min pli kaj pli.

Fine de 1986 mi emeritiĝis. Havante pli da libera tempo mi decidis duobligi la nombron de miaj gekorespondantoj. Dum du jaroj ilia nombro kreskis kaj nun ili estas 52 el 27 landoj. Preskaŭ ĉiutage mi ricevas 3—4 leterojn kaj kompreneble mi devas respondi al ili. La korespondado emociigis min kaj impulsis min plibonigi miajn sciojn de Esperanto kaj pasintjare mi finis sukcese triagradan Esperanto-kurson. Dum la lastaj du jaroj mi tralegis ĉirkaŭ 20 E-librojn aĉetitajn en Bulgario aŭ ricevatajn de miaj gekorespondantoj.

Preskaŭ ĉiuj miaj gekorespondantoj estas tre spertaj esperantistoj kaj kulturaj homoj. Ili informas min pri la vivmaniero de siaj landoj kaj sendas al mi diversspecajn esperantaĵojn. Mi plezure legas iliajn leterojn, kiuj perfektigas miajn lingvajn sciojn. Tre ofte ni interŝanĝas bildkartojn kaj poŝtmarkojn aŭ aliajn memoraĵojn.

Se mi ne povas trovi konvenajn E-literaturaĵojn por sendi al la gekorespondantoj, mi aĉetas librojn en angla, franca kaj germana lingvoj. Preskaŭ al ĉiuj mi sendis la librojn: „Gvidlibro pri Sofio” en la angla kaj la franca, „Bulgario hodiaŭ” en la franca, „Pri via feriado en Bulgario” kaj „Postkursaj legaĵoj” en Esperanto.

Al miaj brazila kaj portugala korespondantoj mi ekspedas regule la semajn-ĵurnalon „Nouvelles de Sofia” en la franca kaj angla lingvoj. Brazila korespondanto Glauco Correa el Florianopolis estas profesoro-roverkisto. Li skribis al mi, ke la unuan fojon en sia vivo li legas bulgaran ĵurnalon kaj tio feliĉigis lin. Eĉ li dankis skribe al la redaktoro de la ĵurnalo. Li petis min, ke mi ofte sendu al li la saman ĵurnalon.

La portugalo Hernâni Resende el Lisbono estas doĉento de historio. En unu letero li skribis al mi, ke li lernis pri la lando de Kiril kaj Metodij. Li skribis al mi, ke la ĵurnalo „Nouvelles de Sofia” li legis unuspire, kun granda plezuro.

Mi diros la veron, ke kiam mi feliĉigas iun el miaj gekorespondantoj mi ankaŭ estas feliĉa. Mi devas diri kuraĝe, ke en la lastaj du jaroj, kiam mia korespondado plivigliĝis, mi ankaŭ estiĝis pli vigla, pli scivolema.

La korespondado donas al mi pli da fortoj kaj deziro vivi. Estas proverbo, ke la scipovo de unu fremda lingvo prezentas al ni unu fenestron al la mondo. Kompreneble, tio estas vero. Dank’ al Esperanto mi konatiĝis kun vivmaniero, tradicioj kaj kutimoj de diversaj landoj.

Impresis min la granda intereso flanke de miaj gekorespondantoj pri nia lando. Multaj deziras viziti ĝin. Mia korespondantino Agnese Vignondo el Torino, Italio, revas kaj planas sekvontjare feriadon en niaj famaj Pirin-, Rila- kaj Rodopi-montaroj, tiel same kaj ĉe la Nigra Maro. La nederlandano Gerard Degen el Gendt speciale vizitis la bibliotekon por serĉi librojn pri bulgara historio. Miaj kvin gekorespondantoj el Nederlando admiras la belegajn bulgarajn poŝtmarkojn, kiujn mi sendas al ili. Ankaŭ Jean Lansiaux el Reims — Francio, Federiko Gialanze el Bergamo — Italio, havis feliĉon ĝui niajn belegajn poŝtmarkojn.

Kelkaj miaj gekorespondantoj skribas al mi afablajn vortojn pri revuo „Bulgara Esperantisto” kaj mi havigas al iuj apartajn ekzemplerojn de la revuo, eĉ mi abonigis du personojn por la sekvonta jaro. Ĉiuj plezure legas ĝin. Tiuj samideanoj kiuj ĝis nun preskaŭ nenion aŭdis pri nia lando estas kontentaj kaj dankaj al mi, ke mi informas ilin pri nia vivmaniero, kutimoj ktp.

Mia korespondado instigas min okupiĝi pli serioze pri Esperanto kaj plialtigi miajn lingvajn konojn, por ke mi ne perdu eĉ unu el miaj gekorespondantoj, por ke estu mia vivo pli interesa kaj ĝoja.

Stanka DIMITROVA

„DUM LA KONGRESO NI KONATIĜIS...”

La kongresa jaŭdo en Roterdamo estis dediĉita al la paco. Kvazaŭ simbolo ĝin gvidis la vicprezidanto de UEA Yosimi Umeda, reprezentanto de la japana popolo, suferinta la postsekvojn de la atombombado. En la plenplena salono „Grabowski” ĉeestis reprezentantoj de pli ol 60 nacioj, unuigitaj de unu lingvo kaj unu nobla ideo pri paco kaj amikeco.

Sur la seĝo apud mi sidis delikata maljuna virino, modeste vestita. Malantaŭ la okulvitroj vigle brilis ŝiaj saĝaj bluaj okuloj. „Samideano, el kiu lando vi estas”, — ŝi demandis. Kaj kiam mi flustre respondis: „El la lando de rozoj”, ŝi tuj plivigliĝinte, aldonis: „Ho, vi estas bulgaro! Kvankam mi neniam ĝis nun estas vizitinta Bulgarion, mi ĝin bone konas, mi ŝatas Vian popolon. Via kaj nia popoloj estas malgrandaj, pacamaj kaj laboremaj popoloj. Inter niaj landoj kuŝas miloj da kilometroj, ni estas amikoj de antaŭ pli ol cent jaroj, nia popolo batalis kune kun la rusoj, por ke via popolo estu liberigita de la turka jugo. Ĉu vi nun komprenas, kiun landon kaj popolon mi reprezentas?” „Jes — mi



AEROGRAMO EL JAPANIO

Petko Bonev el urbo Stara Zagora, elstara aktivulo de BEA kaj regula kontribuantulo de „Bulgara Esperantisto“, ricevis interesan aerogramon de sia japana korespondanto Acuŝi Hoŝida kaj volonte disponigis ĝin al ni.

Tomakomai, '890203

Kara samideano,

Hieraŭ poŝtisto portis al mi pezan pakon registritan. El ĝi aperis belega kaj luksa albumo de la muzeo „The Hermitage“, via valora donaco. Koran dankon!

Kun multaj belaj bildoj kaj priskriboj pri la historioj kaj la artistoj, ĝi donas al mi abundon da eŭropa belarto. Ankaŭ miaj familianoj multe interesiĝas pri la enhavo.

Cetere, via alia donaco, „Bulgara Esp-isto“ havas paĝon de „Deziraro korespondi“. Ĝi bone taŭgas por miaj komencantoj serĉi korespondantojn.

En la lasta decembro, okaze de la Zamenhofa memorkunsido en Sapporo mi kantis kelkajn kantojn de Veselin Damjanov, kies diskon vi bonvolis sendi al mi. Nun tute imponis lia genia kantado kaj mi bedaŭras lian fruan forpason. De la vigla agado de BEA mi deziras multon lerni.

Kun sincera saluto

Hoŝida

Tomakomai, 1989-02-03

Kara samideano,

Hieraŭ poŝtisto portis al mi pezan pakon registritan. En ĝi estas belega kaj luksa albumo de la muzeo „The Hermitage“, via valora donaco. Koran dankon!

Kun multaj belaj bildoj kaj priskriboj pri la historioj kaj la artistoj, ĝi donas al mi abundon da eŭropa belarto. Ankaŭ miaj familianoj multe interesiĝas pri la enhavo.

Cetere, via alia donaco, „Bulgara Esperantisto“ havas paĝon de „Deziraro korespondi“. Ĝi bone taŭgas por miaj komencantoj serĉi korespondantojn.

En la lasta decembro, okaze de la Zamenhofa memorkunsido en Sapporo ni kantis kelkajn kantojn de Veselin Damjanov, kies gramofondiskojn vi bonvolis sendi al mi. Nun tute imponis lia genia kantado kaj ni bedaŭras lian fruan forpason. El la vigla agado de BEA ni deziras multon lerni.

Kun sincera saluto

A. HOŜIDA

respondis — Vi estas finnino. Ankaŭ la bulgaroj tre ŝatas, tre estimas, vian popolon. Ni neniam forgesas, ke viaj bravaj soldatoj batalis por nia libero, lasis siajn ostojn en nia tero. Ni konas nuntempan Finnlandon kiel progresman evoluantan ŝtaton“. Kaj mi forte premis ŝian manon, kore salutante ŝin. Ni interkonatiĝis. Kaj... ho, kia surprizo! Ŝi mallaŭte ekkantis en sia gepatra lingvo. Mi estis mirigita, mi tion tute ne atendis! Post kelkaj strofoj ŝi ĉesis kanti kaj klarigis al mi: „Estas nia popola kanto pri la rusa-turka milito. Mi ĝin kantis kiel infano kaj ankoraŭ memoras ĝin. Ĝin kaj ankoraŭ kelkajn oni kantas de tempo al tempo ankaŭ nun.“ Ĉu vi povas imagi?! Mi estis kortuŝita, mia nacia scivolemo estis provokita, mia nacia scivolemo estis ekscitita. Mi proponis al ŝi starigi amikan kontakton. Mi ŝin petegis, se eble sendi al mi tiujn kantojn. Ŝi bonvole konsentis. Ŝi estis Mirja Perunka.

Post la kongreso ofte miaj kaj ŝiaj leteroj traflugas la milkilometran distancon inter niaj landoj kaj nin ĝojigas. En unu el siaj unuaj leteroj ŝi priskribis sian vivon. Jen estas fragmento el ĝi, kiu eble estus interesa ankaŭ al vi: „... mia plej frua rememoro estas lige kun la pereco de la fama ŝipego „Titanic“... Mi studis kaj diplomiĝis pri fako finna lingvo kaj literaturo en la universitato de Helsinko. Poste mi profesie laboris kiel bibliotekistino en malgranda urbo apud Botnia Golfo kaj poste kiel biblioteka inspektoro en la plej norda parto de nia lando, en la provinco Laponio. Nun mi loĝas en nia bela plej norda urbo Rovaniemi.“

Mirja Perunka ne forgesis sian promeson. Krom la bela novjara gratulkarteto mi ricevis la notojn kaj la tekstojn de du popolkantoj pri la rusa-turka milito kaj kopiitaj paĝoj kun fotoj el malnova historia libro, nun konservata en la biblioteko de Rovaniemi. Ekvidinte la grandformatan koverton kaj poste traleginte, esplorinte ĉion, mi senlime ĝojis. Mi ne dubas, ke ankaŭ vi, karaj legantoj, sentos nacian fierecon konatiĝinte kun tiuj materialoj. Tial mi volonte disponigas ilin al vi. Finante, mi volas proponi al via atento ankoraŭ kelkajn liniojn el la leteroj de mia kara Perunka. Jen estas ili: „Mi estas ĝoja, ĉar mi povas helpi al Vi kaj al ĉiuj karaj bulgaroj kolekti sciojn pri la Rusa-Turka Liberiga Milito... Sed kiam mi komprenis, ke Vi intencas publikigi miajn tradukojn, mi iom hontis — mi ja devis esti pli zorgema, kiam mi tradukis la kantojn. Nun mi volas rakonti miajn rememorojn pri la kanto „Hura-a nia kompanio“. Mi ĝin aŭdis unuafoje dum mia infaneco, kiam mi loĝis ĉe mia onklino, kiu estis popollerneja instruistino en Karelia vilaĝeto. En la klasĉambro samtempe sidis kaj lernis pli ol 40 ĝelernantoj de 8 ĝis 13-jaraj. Mi memoras, ke la infanoj estis tiam tre bonaj. Kaj foje mi aŭdis kiel kantis iu knabo: „Longe suferis pro malsato kaj malvarmo niaj bravaj soldatoj, batalantoj sur montoj de Balkano...“ Al mi tre plaĉis tiu kanto kaj mi ĝin ekkantis. Tiuj kantoj estis konataj eĉ en la vilaĝetoj, jam en la unuaj jaroj de nia jarcento. Kaj eble ankaŭ — nun. Ŝajnas al mi, ke ankaŭ nia nuntempa junularo konas kaj kantas ilin. Ĉar nia popolo simpatiis al Via balkana popolo kaj entuziasme volis vin helpi. Tiu nia simpatio al la bulgaroj vivas ĝis nun“.

Cvjatko TODOROV

Respondo al la divenludo, publikigita sur la paĝo 14 de tiu numero: Wilhelm Heinrich Trompeter (1839—1901).

LA UNUA „BULGARA“ PLANEDO

La nova malgranda planedo 3546—1983 Sc estas nomita „Atanasoff“ omaĝe al prof. John Atanasoff. Tio estas la unua malgranda planedo, malkovrita de kunlaborantoj de la Nacia Astronomia Observatorio sur pinto Roĵen en Rodopi-montaro (proksime de la Internacia Esperanto-Kursejo en Pisania).

Por pli da informoj ni turnis nin al iu el la astronomoj, kiuj malkovris la novan astron — d-ro Vladimir Ŝkodrov el la Memstara Sekcio pri Astronomio ĉe Bulgara Akademio de Sciencoj.

— *Por la unua fojo en nia lando estas malkovrita tia planedo (asteroido), al kiu ni donas nomon. Fakte ĝi estis „kaptita“ per la 50-centimetra Schmidt-teleskopo jam en septembro 1983 kaj tiam ni proponis al la speciala komisiono ĉe la Internacia Planeda Centro en Kembriĝo doni al ĝi la nomon „John Atanasoff“.*

— *Kial nome „John Atanasoff“?*

— *La asteroidon malkovris tri bulgaroj (mi kaj la astronominoj Violeta Ivanova kaj Angelina Georgieva) kaj la fama specialisto el*

Usono Eleonor Helin, kiu jam multajn jarojn okupiĝas pri esplorado de la asteroida zono. Pro tio mi decidis, ke ankaŭ la nomo de tiu asteroido, simile al nia kunlaborado, povas krei „ponton“ inter niaj du landoj. Estas sciata, ke la fama usona sciencisto John Atanasoff, la patro de la nuntempa elektronkalkula maŝino, estas bulgardevena, kaj rekonon pri sia scienca laboro li ricevis unue en nia lando. Jen kial lin kaj lian nomon ni elektis kiel siaspecan simbonon de nia komuna multjara laboro kun la usonaj specialistoj enkadre de la Internacia Astronomia Unuiĝo.

ATLANTIDO EN LA ARBAJ JARRINGOJ

La jarringoj en la pli maljunaj arboj registris kataklismon en 1628 a. K. Arkeologoj datis ĉirkaŭ tiam la malaperon de tiu legenda kontinento, sinkinta eble post vulkanerupto en la insulo Sartorini, sur la Egea Maro, kiun fakton povis registri la arboj. Tre malmulte ni scias pri Atlantido, tiu enigmo, fabela kontinento, kiu — laŭ Platono — okupadis grandan parton de la Atlantika Oceano kaj malaperis post kataklismo. Fakuloj pri dendrokronologio — datado per arboj jarringoj — malkaŝis eblan spuron de tiu katastrofo. Analizinte trunkojn de fositaj arboj konservitaj en irlandaj torfejoj, ili sukcesis dati gigantan vulkanerupton. Kiam arbo kreskas

en malbonaj kondiĉoj, ĝi produktas mallarĝan ringon, dum larĝaj ringoj signas optimuman disvolvon. Arkeologio datas la malaperon de Atlantido ĉirkaŭ la mezo de la dua jarmilo a. K., kaj, kurioze, la jarringoj de ĉ. 1628 a. K. estas nenormale mallarĝaj. Same okazas ĉe hirtkonusaj pinoj en Rokmontaro (Usono), la plej maljunaj vivantoj en la mondo, aĝaj pli ol 4000 j. Kio povis okazi en tiu dato? Ĉio indikas, ke vulkano en la insulo Santorini eruptis kaj elĵetis gigantajn kvantojn da polvo kaj cindro en la atmosferon. Tiu polvo reflektadis la sunvarmon kvazaŭ ŝildo, kaj la klimato suferis drastan malvarmiĝon dum preskaŭ unu jardeko. Ĉi tio kaŭzis la mallarĝecon de

la jarringoj. Tamen restas enigmo, ĉu ja Atlantido malaperis okaze de tiu katastrofo aŭ ĉ. la jaro 1200 a. K., kiel proponis i. a. Jürgen Spanuth. Nur la dato de Platono — 8000 j. antaŭ Solono, t. e. ĉ. 8600 a. K. — ŝajnas fantasta kaj malebla. Resume, 1628 a. K., estas la plej firma kandidato, se tiu kontinento ekzistis entute.

Pri ekzisto mem de Atlantido plu staras la demando, kaj verŝajnas la propono, ke temis pri pluraj atlantikaj civilizoj, ne pli misteraj ol aliaj tiutempaj, kies solaj ĝisnunaj spuroj troviĝas en la memoro de antikvaj rakontoj.

El „Heroldo de Esperanto“ —
n-ro 1/1989



EN LA BUROO DE CE DE BEA

En sia kunsido, okazinta la 1-an de februaro 1989, la Buroo de CE de BEA aprobis la Buĝeton de Bulgara Esperantista Asocio por 1989 kaj etaton el 41 oficistoj. Estis aprobita ankaŭ la Buĝeto de Internacia Esperanto-Kursejo — Pisanica por 1989 kaj ties etato.

CE de BEA invitas por la Internaciaj Instruistaj Esperanto-Kursoj en IEK-Pisanica, en julio kaj aŭgusto 1989 du instruantojn: Jovan Zarko-

viĉ (Jugoslavio) kaj Marta Kovacz (Hungario), por la kurso laŭ Ĉemetodo en IEK-Pisanica, en septembro ĉi-jare instruanton — Audrey Childs-Mee (Nederlando). Estas invititaj 9 eksterlandaj gastoj por la Renkontiĝo de la instruantoj el la socialismaj landoj kun parto de la estraro de ILEI, kiu okazos inter la 24-a kaj 27-a de aŭgusto ĉi-jare en IEK-Pisanica.

En la kunsido, kiu okazis la 22-an

de februaro 1989, la Buroo de CE de BEA unuanime aprobis la raporton de Sava Dălbokov, prezidanto de BEA, pri la okazinta la 11-an de februaro k.j. Plenkunsido de CE de BEA. Dimităr Papazov, ĉefsekretario estas komisiita kunmeti planon por plenumo de la konkludoj kaj rekomendoj el la raporto de S. Dălbokov.

E. G.

SEMINARIO EN PISANICA

De la 27-a de februaro ĝis 2-a de marto j.k. en Internacia Esperanto-Kursejo — Pisanica, okazis seminario de ĉiuj etataj oficistoj de Bulgara Esperantista Asocio. Ĝi ludis rolon de instruado kaj kvalifikado de la etatuloj, kiuj helpas al la E-societoj dum la jar-kunvena kampanjo antaŭ la 42-a Kongreso de Bulgara Esperantista Asocio. Oni traktis la ĉeftaskojn starigitajn dum la lasta Plenkunsido de Centra Estraro de BEA. Krome estis pridiskutitaj jenaj temoj: „Antaŭstarantaj taskoj de IEK kaj ĝia ligo kun la ceteraj eroj de BEA“, „Instruagado“, „Financaj aferoj“, „Taskoj kaj problemoj de la Unuigita Redakcio“, „E-kulturdomoj en Bulgario“, „Regularo de BEA“.

La seminario pasis en afereca etoso. Agrabla distro post la lacigaj tuttagaj okupoj estis la vesperoj en la klubejo-diskoteko, kie la kolektivo aŭskultis muzikon, spektis video-filmojn, dancis.

Dum la veturado reen mi faris enketon en la buso, kolektante opiniojn pri la pasinta seminario. La partoprenantoj respondis al la jenaj demandoj: „Ĉu la seminario estis utila?“, „Ĉu ĝi helpas al la renovigo en BEA?“

Cvetana Ganĉeva: „Mi opinias, ke la seminario estis esence ligita al la renovigo en BEA, sed ekzistis aro da aferoj, kiujn la Organiza Komisiono devintus prepari anticipe. Kaj tamen ni ĉiuj certagrade pensos iom pli profunde pri la renovigo en la Asocio.“

Vasil Vutov: „Utilo estos, sed momente oni ne povas diri kia. Ni ne devas tamen kalkuli nur je seminarioj k. s. por plibonigo de nia laboro, sed precipe je ni mem. Tiuj formoj estas nur aldonajo por plia konkretiĝo de nia laboro.“

Kunĉo Vălev: „La pli bona kompreno de la taskoj, la entuziasmigo sendube estos utilaj por ĉiuj etataj oficistoj de BEA. Tiel ili pli bone laboros por solvo de la starigitaj problemoj.“

Radoslav Paraŝkevov: „Mi certas, ke se ĉiu el ni forportos almenaŭ tiom, kiom li alportis, por ĉiu el ni estos konkreta utilo.“

Ceco Filipov: „La seminario montris, ke renovigon bezonas tiu, kiu ankoraŭ marŝas laŭ la konata malnova vojo.“



Nejko Kunev: „Min la seminario igis pli kuraĝa kaj certa. Laŭ mi ĝi povus helpi al la renovigo en BEA, se ankaŭ ni laborus tiudirekte.“

Elena Stojkova: „Tio estis unua seminario je sufiĉe alta nivelo. Ĝi devas utili!“

Jordan Angelov: „Plej grave estis la interŝanĝo de sperto. La rezultojn ni konstatos poste.“

Dimităr Papazov: „Mi aliĝas al la komunaj pritakso kaj opinioj pri la seminario.“

V. DIMITROVA

KUNLABORANTE NI SUKCESOS

Pasis jaro de la komenciĝinta renovigo en la sistemo de BEA. Tempo sufiĉa por vidi la konkretajn rezultojn. Lige kun tio Vida Bukovinova renkontiĝis kaj interparolis kun la Organizanto de BEA en Burgas-departemento — Elena Stojkova.

— Dum la pasinta periodo de renovigo en Burgas-departemento estis organizitaj sufiĉe da aranĝoj de departementa nivelo. Pro kio Vi orientiĝis al organizado de tiuj aranĝoj?

— Antaŭ ĉio, similaj aranĝoj kontribuas por pli vasta propagando de Esperanto en la departemento. Ilin partoprenas pli da geesperantistoj el la societoj, la esperantistoj konatiĝas bone, interŝanĝas sperton. La aranĝoj estas agadkampoj por la societoj-dommastroj kaj por la aliaj aktivuloj.

— Kie vi trovas apogon dum la preparlaboro kaj realigado de E-manifestaĵoj?

— Antaŭ ĉio en kunlaboro kun la koncerna komisiono ĉe Centra Estraro de BEA, kun societestraroj surloke, kun Gvidkonsilio de Esperanto-domo de kulturo en Burgas, kun aktivuloj de ĉiuj E-societoj. Nur tiamaniere — kunlaborante ni sukcesos.

— Ĉu ĉiuj 17 Esperanto-societoj en la departemento estas pretaj por tiu granda tasko?

— Estas societoj kiel tiuj en Burgas, Ajtos, N. Zagora, Pomorie, Karnobat, Sliven, por kiuj la vorto „renovigo“ estas nur impulso por plua plibonigo de ilia agado. Sed estas malgrandaj novefonditaj societoj, al kiuj oni devas helpi — Kotel, M. Târnovo, Boljaro, Grudovo, Stralĝa.

Estis organizitaj du seminarioj kun la societaj estraroj en Burgas kaj tritaga seminario en IEK — Pisanica.

— En novembro 1988 en Karnobat estis fondita departementa metodikinstrua unuo. Kiuj estas ĝiaj taskoj?

— La regiona metodikista unuo unuigas la geinstruistojn de la rondoj kaj fakultativaj klasoj en la lernejoj kaj tiuj de la civitanaj kursoj. La tasko estas — perfektigo de la instrukapabloj de la geinstruistoj kaj al tiuj, kiuj preparas sin al instruado aŭ plialtigas sian metodikan kaj teorian kvalifikon. Temo de la seminario estis: Praktika lernado de kantoj, didaktikaj ludoj — preparitaj de Svetla Ĥristova el Burgas kaj Janka Ilieva el Karnobat. La 25-, 26-an de februaro ĉi-jare en Sliven ni okazigis duan metodikan seminarion. La temo estis „Uzado de instruhelpiloj dum la Esperanto-instruado“.

Oni observis modelajn lecionojn de instruisto D. Rusinov en Tekstila Faklernejo kaj civitanan kurson de instruistino Galja Nikolova.

— En Burgas-departemento estas elstaraj poetoj kaj tradukantoj kiel P. Papazova, N. Stranĝanski, S. Serafimov, E. Enev, Ĉ. Kantarĝiev k. a. Kion oni faras por ties realigo, por la memperfektiĝo?

— La 18-an de februaro ni organizis kolektiĝon kun tiuj geesperantistoj k. a. en Burgas kaj fondis departementan literatur-tradukan klubon. Akceptita estis plano por ties agado, elektita estis estraro. Prezidanto estiĝis Nikola Stranĝanski el Burgas kaj sekretario P. Papazova el Jambol. En la plano de la klubo oni antaŭvidas literaturajn legadojn antaŭ geesperantistoj el la departemento, el la Internacia Esperantista Laborbrigado, preparon kaj okazigon en decembro 1989 de Teoria Konferenco pri temo „Apero kaj disvolviĝo de la Esperanto-movado en Burgas-departemento, eldonado de almanako „Stranĝa-Sakar“ k. a.

— Kiujn aranĝojn oni planas okaziĝi?

— Baldaŭ en Kotel okazos Regiona Ŝak-turniro, en Burgas — Departementa Revuo de Esperanto -Parolo kaj Kanto, lerneja renkontiĝo sub la devizo „Sanaj, fortaj kaj lernamaj.“

Intervjuis: Vida BUKOVINOVA.



Lernantoj-esperantistoj el la junpionira grupo „David Sasonov“ — Asenovgrad, antaŭ la memortabulo de sia patrono.

Emil ĈIRPANSKI



E-societo „Georgi Stanev“ el Orjaĥovo denove okazigis sian tradician vesperon okaze de Tria de marto — Tago de la liberiĝo de Bulgario el sub osmana jugo kaj 70-jariĝo de E-movado en Orjaĥovo. Estis prezentita literatura-muzika programo, preparita de la juna prezidantino de la societo Rumjana Bogdanova. La vespero pasis sukcese kaj plaĉis al la gastoj esperantistoj el Kneĵa, gvidataj de Ĥristo Karlukovski el urbo Kneĵa. Oni celebris ankan 8-an de marto — Internacia Tago de la Virino.

Nadejda BOSAŜKA

ADRESARO

(Daŭrigo de n-ro 4/1989)

DEPARTEMENTO DE SOFIO

2300 Pernik, P. K. 106
Georgi Stefanov Ĥristov
E-societo „Nova vojo”

2400 Radomir
ul. „Buzluĝa” 6
Elena Ĥristova Portarska
E-societo „Fajrero”

2227 Boĵuriŝte
ul. „V. Peeva” 9
Atanaska Petrova Karabaŝeva

2140 Botevgrad
ul. „Baba Kojna” 1
Mitrofan Vasilev Veleŭ
E-societo „Trifon Ĥristovski”

2187 Ĝurovo
Petko Vasilev
E-societo „Venko”

2040 Dolna Banja
bul. „G. Dimitrov” 186
Cvetana Dimova
E-societo „Vasil Debeljanov”

2240 Godeĉ
ul. „Pionerska” 4
Emilija Krumova
E-societo „Fenestro al la mondo”

2050 Iŝtiman
ul. „Dimităr Milĉev” 10
Veselin Nankovski
E-societo „Slavejko Novanski”

2090 Koprivŝtica
ul. „Ljuben Karavelov” 11
Nedelja Dobrinova
E-societo „Paca planedo”

2030 Kostenec
ul. „Georgi Stankov” 21
Marija Ilinova
E-societo

2110 Novi Ĥan
ul. „Mitko Palauzov” 7
Nikola Krumov Elenkov
E-societo „Nova flamo”

2161 Pravec
bl. 18 vĥ. A ap. 2
Cvetanka Lilova
E-societo „Standardo de la paco”

2000 Samokov
ul. „Ĵitna ĉarŝija” 14
Angel Manĉev
E-societo „Rila esperantisto”

2200 Slivnica
ul. „Ĉerveno zname” 12
Milka Aleksieva
E-societo „Monda paco”

2080 Srednogorie
kv. „Zlatica” bl. 22, ap. 22
Ilija Iliev

2260 Svoge
ul. „Gaber” 8
Elena Jordanova Radenkova
E-societo „Amikeco”

2109 Gara Elin Pelin
kv. 14 bl. 3 vĥ. 2 ap. 26
Ivanka Koleva Boŝnakova

2500 Kjustendil
ul. „Pautalija” 5
Georgi Kaljaŝki
E-societo „Flamo”

2640 Koĉerinovo
Osnovno uĉiliŝte
Vladimir Radkov
E-societo „Aŭroro”

2600 Stanke Dimitrov
ul. „Rodopi” 44
Emilija Boĵilova
E-societo „Marek”

2630 Rila
ul. „Kiril Naĉev”
E-societo „Libero”

2700 Blagoevgrad
ĵk. „Alen mak” bl. 8 vĥ. 2
Metodi Markov
E-societo „Espero”

2770 Bansko
ul. „V. Il. Lenin” 18
Marija Koĵareva
E-societo „Pirin-montaro”

2780 Belica
ul. „Goce Delĉev” 9
Marija Bankova
E-societo „Rila”

2846 Kresna
ul. „G. Dimitrov” 4
Kiril Ĥristov
E-societo „N. J. Vapcarov”

2850 Petriĉ
ul. „Goce Delĉev” 8
Kiril Ĥlebarov
E-societo „Esperanto triumfonta”

2760 Razlog
ul. „Benkovski” 24
d-ro Elena Keranova
E-societo „Pirina flago”

2730 Simitli
kv. „Oranovo” bl. 3
E-societo „Al monda paco”

2650 Sapareva Banja
Osnovno uĉiliŝte
Vladimir Radkov
E-societo „Aŭroro”

(Daŭrigo en n-ro 6/1989)

Memore al GEORGI CVETKOV

Tute neatendite la 11-an de februaro 1889 forpasis nia kara amiko kaj samideano Georgi Cvetkov Ivanov, direktoro de la Internacia Esperanto-Kursejo en Varna. Li naskiĝis la 10-an de oktobro 1936 en la pitoreska vilaĝo Kirjacevo, Miĥajlovgrad-departemento. Li finis Maŝinan Lernejon en Sofio kiel plenrajta ŝipmekanikisto. Dum pli ol 16 jaroj li laboris kiel ŝipmekanikisto sur la ŝipoj de Bulgara Mara Floto — Varna, navigante sub bulgara flago en proksimaj kaj malproksimaj maroj kaj oceanoj.

Antaŭ 25 jaroj Cvetkov eklernis Esperanton en la Cseh-metoda kurso de doc. Georgi Dimov. Li ekamis Esperanton kaj eklaboris entuziasme por efektivigo de la noblaj ideoj de d-ro L. L. Zamenhof. Li estis multjara prezidanto de Esperanto-societo „Albatroso“ en Varna. Dank' al li la societo havas propran klubojn en la centro de la urbo kaj riĉan bibliotekon. Li estis vicprezidanto kaj prezidanto de Distrikta Estraro — Varna, membro de la Estraro de „Monda Turismo“, membro de UEA kaj ties faka delegito pri navigado mara. Li estis sekretario de la Loka Kongresa Komitato de la 63-a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en 1978 en Varna. Pro lia fervora agado dum la Kongreso, la Estraro de UEA kaj persone ĝia prezidanto prof. d-ro Humphrey Tonkin esprimis dankon.

Depost la 1-a de septembro 1978 Georgi Cvetkov estis direktoro de la Internacia Esperanto-Kursejo en Varna. Lia granda merito estis la farita antaŭ 3 jaroj kontrakto inter IEK kaj la direkto de 4-a Lingva Gimnazio „Frédéric Joliot-Curie“ en Varna (Gimnazio asociigita al UNESKO). Laŭ tiu ĉi kontrakto oni enkondukis Esperanton fakultative en la gimnazion. Ĉiujare IEK-Varna organizis por la gelernantoj kaj instruistoj, lernantaj Esperanton, sendevizajn ekskursojn al Sovet-Unio, Ĉeĥoslovakio kaj Hungario. Ĉiujrintempe de la 20-a ĝis la 30-a de marto, la gelernantoj el la prepara kurso, kune kun siaj instruistoj vizitis IEK-Pisanica por lerni kaj promeni.

Ĝis nun, pere de IEK-Varna, nian urbon kaj la marbordon vizitis 17999 somerumantoj kaj dezirantoj lerni Esperanton el 15 proksimaj kaj malproksimaj landoj (Islando, Finnlando, Pollando, Hispanio, Italio, Usono, Sovetunio).

Pro lia sindona agado en IEK-Varna, Georgi Cvetkov estis premiita de CE de BEA per partopreno en la 71-a Universala Kongreso de Esperanto en Beijing, Ĉinio, kie li helpis la Lokan Kongresan Komitaton. De tie li ricevis entuziasman dankleteron.

Pro sia sindona poresperanta laboro Cvetkov estis honorita per ordeno „Kiril kaj Metodij“, per la Ora Insigno de BEA kaj per la Ora Medalo „100 jarojn Esperanto“ de CE de BEA.

Kun lia frua forpaso la esperantistaro en Varna kaj Bulgario perdis unu el siaj plej agemaj kaj fidelaj membroj.

La bulgaraj esperantistoj konservos bonan memoron pri lia abnegacia kaj fruktodona poresperanta agado.

Ni estimplene kliniĝas antaŭ lia hela memoro.

Al la funebrantaj edzino kaj filino niajn sincerajn kondolencojn:

Doc. Georgi DIMOV

Invito al SEFT 1989

• Somera Esperantista FERIA Tendaro

• Somera Esperantista FAMILIA Tendaro

Tempo: 1989—08—19/26;

Loko: tendejo C/86 en regiono Feldberg

Kondiĉoj: Memprizorgo (tendo, manĝo).

Ideo: Komuna tendumado de infanoj, familioj, junuloj, soluloj ktp. en esperantista etoso.

Programo: Migrado tra la arbar-kaj lagriĉa naturo, ekskursoj (unu ŝipekskurso), vesperaj kunvenoj, prelegoj, kantoj, fabelhoroj por infanoj ĉiuvespere.

Rimarkoj: Kunportu tekstojn de prelegoj, muzikinstrumentojn kaj pripensu aliajn amuzajn programojn, ĉar la programojn la partoprenantoj memstare aranĝos.

Alveneblecoj:

trajne: EL Berlin aŭ el nordo ĝis Neustrelitz, tie elvagoniĝu! El Neustrelitz per trajno al urbeto Feldberg, de tie piede aŭ aŭtostope al la tendejo C/86 Thomsdorf.

bicikle: De Feldberg al vilaĝo Carwitz — sed ne veturu maldekstre en la vilaĝon, sed rekte al arbaro (kampa vojo), de tie ankoraŭ 2 km.

Aliĝado: GDR-anoj devas skribi al: Zeltplatzvermittlung, Am Kietz 14, Waren 2060. Eksterlandanoj povas aliĝi surloke. Krome: Bonvolu sendi la aliĝilon al Werner Pfennig!

Informoj: Werner Pfennig, Fohlenwinkel 13, Neubrandenburg, GDR—2000

Distrikta Estraro de GDREA, Neubrandenburg

SUB LA CIRKA KUPOLO



Ĉiu el ni portas en sia koro impresojn kaj imagojn pri la cirko. Kiel pompa fabelvidaĵo. En niaj infanaj sonĝoj kaj rememoroj ĝi restis nur. Sed la cirko estas ankaŭ vera arto kaj ĝi bezonas bravajn kaj abnegaciajn artistojn, kiuj senlace klopodas ĝojigi la publikon kaj plene meritas ĝian rekonon.

Ekde tiu momento, kiam mi unuafoje ĉeestis cirk spektaklon, kiel ĵurnalisto, pasis jaroj, dum kiuj mi ofte skribis pri la sukcesoj, malfacilaĵoj kaj problemoj de tiu ĉi arto. Mi vidis brilajn spektaklojn, sed mi vidis ankaŭ lacajn artistojn kun frotvunditaj manoj kaj dorsoj, vadantajn en la koto ĉirkaŭ migrantaj cirkoj.

Antaŭ du jaroj ni festis la 90-jariĝon de la bulgara cirk-arto, kiu sendube estas tre populara. Ni povas esti fieraj, ĉar dum la lastaj jardekoj cirkartistoj gajnis la plej grandajn premiojn en mondaj kaj internaciaj festivaloj, miloj da spektantoj el ĉiuj kontinentoj admiris ilian arton.

Mi povus paroli pri multaj artistoj kaj trupoj, sed nun mi kontentiĝos rakonti al vi pri unu el la plej famaj bulgaraj cirktrupoj — la trupo Keĥajov.

Lastjare ili gajnis grandajn internaciajn premiojn. Somere kaj aŭtune de 1988 trupo Keĥajov rikoltis sukcesojn en la grandaj japanaj urboj Sapor, Osaka kaj Tokio. Post la turneo en Japanio ili forveturis al Usono, ĉar la trupo havas dujaran kontrakton kun la plej granda en la mondo cirko „Ringling and Barnum — Bajley Bros“. Simila kontrakto estas honoro por ĉiu cirkartisto, konsiderante la fakton, ke trupo Keĥajov estas invitita ludi en la sama usona cirko por tria fojo. Dum tiuj jaroj ili traveturis la tutan teritorion de Usono kaj Kanado, kaj ludis en la plej grandaj sportaj kaj festivalaj haloj. Mi volas substreki, ke ekde 1966 bulgaraj cirkartistoj konstante ludas en Usono.

La historio de trupo Keĥajov estas intime ligita kun ĝia fondinto kaj gvidanto Georgi Keĥajov.

Pasis pli ol tridek kvin jaroj depost la tempo, kiam li kiel junulo venis el sia naskiĝurbo Asenovgrad en Sofion por ligi sian sorton kun la cirk-arto. Komence Keĥajov ludis en famaj bulgaraj trupoj Dobriĉ kaj Silagi. Liaj kolegoj memoras lin kiel perfektan akrobaton.

En 1972 Georgi Keĥajov kaj lia edzino, ankaŭ cirka artistino, altiris dek knabojn kaj unu knabinon, kiuj ĉiuj ĵus komencis okupiĝi en la cirka lernejo ĉe la tiama Sofia Cirko. Fakte tio estis la komenco de la estonta trupo. Keĥajov havis tre ambician programon kaj obstine trejnis sian novan kolektivon. Multaj opiniis, ke fari trupon el komencantaj artistoj estas almenaŭ duba eksperimento. Sed post nelonge trupo Keĥajov estis invitita partopreni spektaklon de la brita cirko „Chipperfields“. Post tiu kelkmonata gastado en Britujo la specialistoj estis unuanimaj — la juna kolektivo de Georgi Keĥajov estas fenomeno.

Fine de la sama 1972 la junaj artistoj turneis en Usono. En tiu lando la cirk-arto diferencas de la eŭropa laŭ sia stilo. En Usono oni kutime ludas samtempe sur tri arenoj kaj estas honoro por sola artisto aŭ trupo ludi sur la centra areno. La usonaj programoj komenciĝas per granda parado de elefantoj kaj en ĝi ne mankas bruoj kaj brilo. La Trupo de Keĥajov devis rapide alkutimiĝi al tiu stilo.

Ne atingebla ĝis nun estas la rekordo de la eksartistino el la sama trupo Emilija Ivanova, kiu somere de 1976 antaŭ publiko en Kalifornio prezentis fenomenan atingon — kvaroblan malantaŭan akrobatan salton! Pri tio en Usono skribis multaj gazetoj kaj revuoj. Pli malfrue, kiam ni interbabilis kun Emilija, ŝi ridetante diris, ke en tiu somero ŝi estis la plej feliĉa junulino en la mondo kaj estis forta kaj kapabla fari ĉion en la cirka akrobatiko.

Iom post iom la plenumoj de la trupo komplikiĝis. Aldoniĝis novaj elementoj. La cirka akrobatiko ne estas sporto, dank' al la akompano, belaj vestoj, speciala lumo kaj antaŭ ĉio dank' al la konduto de la aktoroj ĝi fariĝas vera arto — rava kaj mistera. En ĉiu sia plenumo Trupo Keĥajov pruvas tion.

Milionoj aplaudis ilin. En 1978 en Nov-Jorko la trupo atingis novan rekordon: desaltante de sur speciala saltotabulo (trampolino) kaj helpe de alumina tubo la artistoj faris kolonon el ses homoj. Kvin jarojn poste, dum gastado, ili sukcesis fari kolonon el sep homoj.

Komence de la 80-aj jaroj preskaŭ ĉiuj artistoj en la trupo sanĝiĝis, sed feliĉe, ne rompiĝis la bonaj tradicioj. Male, la trupo atingis ankoraŭ pli grandajn sukcesojn. En 1985 ili gajnis la premiojn Ora Cirko en Romo kaj Arĝenta Olimpiko en Lieĝo.

La plej eminenta forumo por cirkaj artistoj estas la Monda Cirka Festivalo, en Monte Karlo, kiu okazas ĉiujare ekde 1972. Ĝis nun sep bulgaraj trupoj gajnis grandajn premiojn en tiu festivalo. En 1987 nur malŝanco estiĝis la kaŭzo, ke Trupo Keĥajov cedis la unuan premion al ĉeĥaj akrobatoj. Por la bulgaroj restis la dua premio — Arĝenta Klaŭno.

Sukcesoj eblas nur per senlaca laboro kaj amo al sia arto. Tio signifas: spektaklon post spektaklo, provludadon post provludado kaj denove — eterna

rondo sen fino. Trupo Keĥajov, kiel aliaj iliaj kolegoj, estas ĉiam survoje. En veturado pasas ilia vivo, sed ili ĉiam restas junaj.

La familio de Georgi Keĥajov loĝas en Sofio. Lia domo estas malgranda cirka muzeo — fotoj, afiŝoj, programoj de spektakloj, videokasedoj kun cirkaj plenumoj. Estas plezuro aŭskulti la rememorojn de Keĥajov. Dum ni interparolis, mi aŭdis bruon en la ĉambro de lia filino Despina — ŝi trejnigis sin. Ankaŭ Despina jam estas fama artistino, malgraŭ ke ŝi havas nur dek ses jarojn.

Por familio Keĥajov la cirko evidente fariĝis hereda profesio. Pro tio mi ofte pensas, ke ĝi estas ne nur brila arto, sed ankaŭ homa sorto.

Atanas ILKOV



Sur ambaŭ fotoj — trupo Keĥajov. Ĝia atingo estas la prezento de kolono el sep personoj.

ESPERANTO-KURSO EN RADIO

Esperanta Grupo „Giorgio Canuto“ de Parma informas, ke la sendependa loka radiostacio „Radio Idea 12“, en Parma, Italio, ekde la 30-a de januaro elsendas la gravan Esperanto-kurson „Jen nia mondo“ eldonitan

de Itala Esperanta-Federacio (F. E. I.), kiu havas bonan sukceson.

Ĉiu leciono estas ripetata trifoje semajne (lunde je la 10.40, merkrede je la 12.30 kaj vendrede je la 16.00

horo) en kanaloj 93 kaj 98.9 F. M.

Do, ni tre varme petas diverslandajn gesamideanojn sendi kuraĝigojn kaj Esperantajn bondezirojn por la indaj estroj de „Radio Idea 12“, via Bottego 3, **43100 Parma, Italio.**



Dezir korespondi

BULGARIO

MARIANA EVLOGIEVA (24-jara, filologo) — 3400 Miĥajlovgrad — 2, ul. „Miladin Kunčev“ 41 — kun ĉl, prefere pri interlingvistiko, esperantologio, instruado de fremdaj lingvoj, arto, psikologio kaj florproduktado.
ANA ZAMFIROVA (36-jara, flegistino) — 7200 Razgrad, ul. „Lajpcig“ 49 — kun ĉl pri ĉt.

GINKA CANCEVA (39-jara, instruistino) — 7200 Razgrad, ĵ. k. „V. Levski“ bl. 3 ap. 18 — kun ĉl pri ĉt.
PANAJOT PANAJOTOV (24-jara, oficisto) — 7200 Razgrad, ul. „Bačo Kiro“ 6 — kun ĉl pri ĉt.
RADKA STOJANOVA (53-jara, instruistino) — 7200 Razgrad, ul. „Ivan Vazov“ 38 B, ap. 33 — kun ĉl pri ĉt.

GRUPO GEESPERANTISTOJ (15—17-jaraj) — gara Elin Pelin, Teĥnikum za keramika i staklo „Ilija Jordanov“, klubo „Espero“ — kun samaĝuloj el ĉl.
CVETELINA NIKOLOVA (18-jara) — 1336 Sofio, ĵ. k. „Ljulin“ — 3, bl. 301, vĥ. 2, ap. 49 — kun ĉl pri ĉt.

ĈEĤOSLOVAKIO

D-ro PETR ŠMID (29-jara) — 54701 Náchod, Kostelecká 1829 — kun ĉl pri turismo, fotografio, sporto, moderna muziko, juro.

HUNGARIO

SCIGE ÁGNES (31-jara, instruistino) — Budapest, XIX, Jokai u. 2, II. 5, H—1195 — kolektas librojn.

POLLANDO

JOANNA SELWA (21-jara) — 50—309 Vroclavo, ul. „Klary Zetkin“ 7/5 — kun ĉl pri lingvoj, muziko, modo, vojaĝado, sporto.

JOZEF JANACZYK (46-jara, inĝeniero) — 65—389 Zielona Gora, ul. „Podwojna“ 1a — kun ĉl pri turismo kaj E-movado.

TOMASZ PRÓCHNIAK (26-jara, ekonomikisto) — 89—413 Wawelno, woj. Bydgoszcz — kun ĉl pri

literaturo, filatelo, muziko, ornitologio kaj geografio.
DANUTA ZIEBA (20-jara) — 33—125 Brzostek, ul. „Wola Brzostocka“ 94 — kun ĉl pri turismo, literaturo kaj folkloro. Kolektas pm. bk.

JOLANTA STENCEL (24-jara, instruistino) — 04—052 Warszawa, ul. Grenadierów 25/27 m. 57 — kun ĉl pri turismo kaj muziko.

WOJCIECH LEITLOFF (18-jara) — 90—113 Łódź, ul. Sienkiewicza 6 m. 10 — kun ĉl pri sporto, geografio kaj teatro. Kolektas poŝtmarkojn kaj monerojn.

ZBIGNIEW MALYSZKO (50-jara, abelisto kaj ĉinĉilobredisto) — 15—531 Białystok, Zajęcza 17 — kun ĉl pri fotoarto, literaturo kaj libroverkado.

SOVETUNIO

VLADIMIR BURLIN (33-jara) — 123363 Moskvo, Himkinskij bulv., 19—1—74 — kun ĉl pri ĉt.

METELJOVA NADEJDA (25-jara) — SU—610021, Kirov, ul. Vorovskogo, d 102—144 — kun ĉiuj, kiuj interesiĝas pri hinda kulturo.

ANOJ DE LA KOLEKTANTA KLUBO deziras korespondi kaj interŝanĝi kun kolektantoj el ĉl — 220107 Minsk, ul. Narodnaja II—76, Vladimir Kornijenko.

IVARS BARSEVSKI (46-jara) — SU—238700, Sovetsk, Iskri 7-a, 25 — interŝanĝas bk, E-periodaĵojn kaj librojn tutmonde.

JURIJ MAĤOV (50-jara, oficisto) — SU—180016, Pskov—16, ul. Jubilejnaja, 52—16 — kun ĉl pri ĉt. Kolektas pm.

TATJANA DJURILO (23-jara, edukistino) — SU—350040, Krasnodar, Abon. ja. 377 — interesiĝas pri pentrado, pedagogio, trikado, kudrado. Kolektas pm, bk, kalendaretojn.

GEORGIJ MEDVEDEV (40-jara, inĝeniero) — SU—428900, Novoĉeboksarsk, ul. 10 pĵatiletki 58—16 — kun ĉl pri ĉt.

VILIJA VIZIENE (36-jara, ekonomikistino) — SU—232056, Litovio, Vilnius, Viršuliškiu 67—53 — kun ĉl pri ĉt.

NIJOLE ARUNAITE (25-jara, farmaciistino) — SU—235300, Litovio, Panevežys, Bugos 14 — kun ĉl pri medicino, turismo, vojaĝoj.

OLEG STRELECKIJ (27-jara, inĝeniero) — SU—220050, Minsko—50, ul. Mjasnikova, 78 1.5 — kun ĉl pri ĉt.

NI KONDOLENCAS



La 5-an de marto 1989 subite forpasis **IVAN NIKOLOV PERFENOV**, aktiva esperantisto, vicdirektoro de Internacia Esperanto-Kursejo — v. Pisanica. Li naskiĝis la 4-an de decembro 1944 en v. Pisanica, Plovdiv-departemento. Sian tutan vivon li dediĉis al popularigo de la Internacia Lingvo Esperanto, al internacia kompreniĝo kaj daŭra paco en la mondo.

Ni estime kliniĝas antaŭ lia hela memoro!

La kolektivo de IJK-Pisanica

La 7-an de marto k. j. forpasis en Sofio Radka Radoeva Danĉeva. Ŝi naskiĝis la 31-an de januaro 1910 en vilaĝo Rakita, Loveĉ-departemento. Dum la kontraŭfaŝisma batalo Danĉeva estis kuriero de CK de Bulgara Komunista Partio kaj kaŝis persekutatajn kontraŭfaŝistojn. Pro tiu agado ŝi estis jetita en malliberejon. Post la liberiĝo de nia popolo la 9-an de septembro 1944 ŝi aktive partoprenis la junularan brigadan movadon kaj poste laboris en Radio Sofio.

Radka Danĉeva estis fervora esperantistino kaj turistino, kiu regule partoprenis Esperantajn aranĝojn.



„ESPERANTO-TURISMO RETROSPEKTIVE“

Por verki la centjaran historion de la Esperanto-Turismo ni alvokas ĉiujn „esperantistojn“ serĉi intersiaj esperantaĵoj jenajn materialojn:

— eltranĉaĵoj, fotokopioj de Esperanto-gazetoj, revuoj, broŝuroj ktp., kiuj temas pri turisma agado pere de Esperanto;

— afiŝoj, insignoj, saketoj, faldfolioj (originaloj aŭ fotoj);

— kopioj aŭ citaĵoj el libroj eldonitaj precipe en la komencaj jaroj de nia jarcento; bonvolu mencii la titolon, aŭtoron kaj daton de la eldono;

— alispecaj raportoj pri Esperanto-turismo en la pasinta jarcento.

Al la plej valoraj kontribuoj, kiuj per tio iĝos niaj kunlaborantoj, estos aljuĝitaj jenaj premioj: unusemajna senpaga partopreno (sen vojaĝkostoj tien kaj reen!) en Esperanto-aranĝo en la jaro 1990 en Benelukso, Hungario, Pollando aŭ E-eldonaĵoj.

La materialojn sendu al s-ino Elizabeta Pallos, H—7633 Pecs, Ybl M. u. 9.1/2, Hungario.

Limdato por alveno de la materialoj. (2 tajpitaj ekzempleroj): **10.9.1989.**

La aljuĝo de la premioj okazos dum la 15-a Internacia Foiro de Esperanto-Turismo, kiu okazos la 25-an — 30-an de septembro 1989 en Bydgoszcz, Pollando.

**Estraro de
„Monda Turismo“**

SIERO'89

E-societo „Georgi Stanev“ — Orjaĥovo, invitas vin partopreni en la somera insula Esperanto-renkontiĝo „SIERO'89“, dediĉita al la 70-jariĝo de la E-organizaĵo en Orjaĥovo.

La aranĝo okazos 14—16.7.1989, en Orjaĥovo. Inter alie, ĝi celas revivigi la bonan tradicion de la pasinteco — insulo Esperanto denove estu loko de ĉiujaraj E-entreprenoj, por ke multaj esperantistoj — bulgaroj kaj alilandanoj, povu ĝui ĝian belecon kaj la imponan vidaĵon de vasta blanka Danubo.

ANONCO

Literatur-traduka Klubo en Burgas-departemento preparas teorian konferencon je temo:

„Apero kaj disvolviĝo de la Esperanto-movado en Burgas-departemento“ en decembro 1989.

Oni invitas ĉiujn esperantistojn ligitajn kun la Esperanto-movado en Burgas-departemento partopreni la Konferencon.

La materialojn de la Konferenco oni publikigos en speciala broŝuro. Informas: 8000 Burgas, P. K. 303,

Esperanta domo de Kulturo, Elena Stojkova, tel. 3-21-72.

25-A JUBILEA ESPERANTISTA FERIADO EN MIĘDZYGORZE

Internacia Esperantista Feriado en Międzygorze (Pollando) jubileas. En 1989 okazos tri jubileaj feriskipoj, ĉiu por 600 feriantoj:

— „Esperanto hejme“, 17—30.08.1989 (ĉefe por familioj, instruistoj, lerneja junularo)

— „Adiaŭ somero!“, 2—15.09.1989 (ĉefe por studentoj kaj laboranta junularo)

— „Ora pola aŭtuno“, 17—30.09.1989 (renkontiĝo de diversaj generacioj).

La feriadon iniciatis kaj daŭre okupiĝas pri ĝiaj organizaj problemoj la konata pola esperantisto Edward Woytakowski. Komence estis organizata unu septembra feriskipo, ekde 1982 oni organizas aŭgustan feriskipon por ebligi partoprenon al instruistoj kaj lerneja junularo. Sume en la jaroj 1965—1988 partoprenis pli ol 10 mil personoj el 30 landoj.

Partoprenkotizo por dusemajna restado estas: 200 us. dol., 412 gld., 365 DM, 113 anglaj pundoj, 1250 sv. kr., 850 fin. m., 1245 fr. fr., 2570 aŭstr. ŝ., aŭ egalvaloro en alia valuto.

Partoprenkotizo por civitanoj de socialismaj landoj: 800—1086 GDR-Markoj, 2500—3395 cs. kronoj, 5535—7510 forintoj, 330—448 levoj, 312—424 rubloj.

Aligojn akceptas kaj detalajn informojn sendas: Pola Esperanto-Asocio, P. O. Kesto 16, ul. Dubois 3, PL 50—952 Wrocław 17, Pollando.

Estraro de PEA-Filio en Vroclavo

NACIA MEDICINA KONFERENCO

La nacia konferenco de Medicina Sekcio ĉe BEA okazos je la 14-a de oktobro (sabate) j. k. en Plovdiv. La temo estos „Paciento kaj kuracisto fronte al Esperanto“. Prelegantoj devas sendi la titolojn kaj la aŭtorajn nomojn ĝis la 31-a de julio ĉ. j. Por informoj turnu sin al la adreso: 4000—Plovdiv. Esperanto-domo pri kulturo (Medicina klubo), P. K. 184.

ARANĜO EN ŽILINA

Dekunuaj Turismaj Tagoj en Žilina okazos ekde 29.7. ĝis 4.8.1989.

Detalojn kaj aliĝilojn petu ĉe Esperanto-klubo B 152, Žilina 010 42, Ĉeĥoslovakio.

Esperanto-klubo Žilina



LA PREMIO

AMUZA ZODIAKO



TAŬRO
(22.04—21.05)

*Sciu vi: ĉi besto tre danĝeras!
Klara tuta viv' por ĝi aperas.
Ĉiam eksplodemas kaj spitemas,
rajton poreterne ekhavemas.*

*Povas plulabori dum multjaro,
por havigi eĉ al parencaro...
Ofte plureformas, dislokas,
ŝrankojn novajn ĝi al si starigas.*

*Per insida sia mor' altiras,
post granduloj ofte rampe iras...
Propra estas ĝia reklamemo,
ĝi ceterajn laŭdas pro trompemo.*

*Iuj estas plaĉaj kaj bonetaj,
trinkas, kantas, amoj, virinetaj.
Do satege manĝi trodeziras,
ilin kompanioj tre altiras.*

*Di' ne donu, ke vi ilin enombrigu,
por ke ili viajn tagojn ne nigrigu:
ĉiam kompromitos vin, mensogos,
do, per bono vin jam ne apogos!*

*Nigra kat' ilia — jen Amforo,
kaj ilia ŝanc' ĉe ĝi — en foro!
La Skorpio ilin ege amas.
Tamen Taŭro ĉe Ĝemelo flamas!*

Esperantigis: Asen JOSIFOV

Ĝis la difinita limdato solvojn de la publikigita en n-ro 1/1989 de „BE” Magia enigmo sendis Violeta Štereva el Ĥaskovo, Atanas Gaev el Asenovgrad, Vasil Georgiev el Ŝumen, Cveta Popova el Pernik, Ivan Girgičov el Ajtos, Ĥristina Terzieva el Velingrad, Asen Josifov kaj Georgi Nejkov el Sofio. Ĝiajn solvojn ankaŭ sendis Roza Halasz el Hungario kaj Marieta Ŝoŝeva el Sofio, kiu ankaŭ skribis jenon al ni: „Mi esperas, ke ni — la legantoj de revuo „Bulgara Esperantisto”, pli ofte trovos sur la „Distra paĝo” enigmojn, ĉar ili estas ne nur amuzaj, sed ankaŭ utilaj por esperantistoj, kiuj deziras plialtigi sian lingvan nivelon.”

Post lotumado la premion ricevas **Elena Atanasova el Varna**. Ni sendis al ŝi la libron „Ruza Petro” — unu el la lastaj eldonaĵoj de BEA. Gratulon!

Fine jen la solvoj de la Magia enigmo: **Somalia, Manio, Mantelo, Lieno, Biologo.**

Estimata redakcio!

Jam kvaran jaron nia klubo abonas vian revuon „Bulgara Esperantisto”. Sed precipe la plej novaj numeroj estas tre interesaj kaj valoraj. En n-ro 12/1989 plaĉis al ni la artikolo „300 jaroj de la ribelo de Ĉiprovcio”. Interesa estas la krucenigmo kaj la lasta distra paĝo.

Mi sendas al vi la solvon de la krucenigmo publikigita en n-ro 12/1989 de „BE”.

Krome mi sendas al vi kelkajn „transglitajojn”. Tio estas enigmoj, en kiuj per transglitigo de unuopaj literoj vi ricevos el unu vorto aŭ el grupo da vortoj sen ia speciala senco plensencan vorton, substantivon. Ekzemple: urba ligo — Bulgario.

Jen estas la enigmoj.

ILO VOKAS
NE ESTIS PARTO
INA ZORGO
AKTIVA UZO
RIZA PADO
JURA NULO
REKTA ORDO
MIRINDA STACIO
TERURA LITO
VI STERKO
KARA DAMO
ORA VANGO
TERA PENSO
LINA MODO
ETA FORMO
LEDA KARNO
DIRO POST

Inĝ. Ivan SLAVIK,
NOVA DUBNICA, Ĉeĥoslovakio

Noto de „BE”: Ni afable dankas al inĝ. Ivan Slavik pro lia kontribuado. La solvojn kaj la nomon de gajninto ni publikigos en n-ro 9/1989. Ni atendas la solvojn de niaj legantoj ĝis la 10-a de julio j. k.

